

EL POPOLA ĈINIO

中國報

2

1975





Ĝoje Renkonte al Printempa Novo (gũaŝo)

pentraĵo de Fu Gong (manĉuo)
versaĵo de Ven Daŭ

Al montvilaĝo venas feraj bovoj —

Nova armeo por agrikulturo;

Ridas la homoj, bruas la tamburoj,

Ĝoje renkonte al printempa novo.

Ili-anoj Unuanime Konstruas la Landliman Regionon



Elstara kazaĥa paŝtistino Ga-
nati de Guozigoŭ-paŝtejo

Kune laboras la komunumanoj kazaĥa, ujkura
kaj han-a de iu produkta grupo, Hinjuan-
gubernio.




La Ili-a Kazaha Aŭtonoma Subregiono de Hingiang inkluzive de Altaj- kaj Taĉeng-regionoj kaj la gubernioj kaj urboj de Ili-a Rivervalo havas areon de 350,000 kvadrataj kilometroj, kiu okupas kvinonon de la totala areo de Hingiang. Tie koncentre loĝas ĉinaj kazaĥoj.

Post la fondiĝo de la aŭtonoma subregiono en la jaro 1954, precipe post la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj en la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la diversnaciaj popolanoj de Ili strikte unuiĝas kaj peneme konstruas en mal-faciloj, sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio. Dank' al tio multe ŝanĝiĝis la fizionomio de Ili kaj nun prospero regas ĉie en la loko. En 1973, la nombro de brutoj

en la tuta subregiono estis 2.5-oblo kaj la totala produktokvanto de greno 3-oblo de tiuj en la komenca periodo post la Liberiĝo. Antaŭ la Liberiĝo, tie troviĝis neniu industrio, sed nun jam stariĝis la bazaj industrioj de ferŝtalo, karbo, min-ekspluato kaj elektraj maŝinoj, rapide disvolviĝas la industrioj de lanŝpinado, ledo, papero kaj kemio. Ankaŭ la financa, komerca, kultura, eduka kaj higiena aferoj rapide progresas, kaj la popola vivo iom post iom pliboniĝas. La loĝantaro de diversaj naciecoj en la tuta subregiono pliiĝas ĝenerale, kaj nur la nombro de kazaĥoj sola kreskis je 45 procentoj pli multe ol tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo.


Multaj komunumoj kaj ŝtataj kultivejoj kaj paŝtejoj estas mekanikigitaj.





Riĉa rikolto de greno

Sekretario de la partia komitato de Dongfeng-komunumo
Hinjuan-gubernio, rakontas pri la batalo inter konfucianism
kaj legalizismo sur paŝtejo.






La famaj Ili-aj ĉevaloj breditaj de la Ĝaŭsu-a Ĉeval-generejo





La Hingiang-aj bon-lanaj ŝafoj sur stepo en Ili-a Rivervalo

La nove konstruita akvoutiliga pivota konstruaĵo sur Kaŝgar-rivero.



Funkcias elektrejo de Fujun-gubernio, Altaj-regiono.

Intelektaj junulinoj de agronomia grupo kaj maljuna kamparano observas la bonan specion de tritiko.



Kazaĥa kaj sibo-a la-
boristinoj de la Ili-a Lan-
ŝpina Fabriko




Ujguraj komunumaninoj de
Honghing-komunumo rikoltas
pomojn.





Feliĉaj kazahaj infanoj



Arta prezentado por paŝtistoj.

Nova Fizionomio de Hiaŭginguang

HIAŬGINĜUANG estas produkta brigado kun 101 familioj, kiu troviĝas en Baŭdi-gubernio ĉe la antaŭurbo de Tiangin. Granda ŝanĝiĝo okazis al la brigado en la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la movado de kritiko kontraŭ Lin Biau kaj Konfucio. Nun la malnovaj ideologio, kulturo, moroj kaj kutimoj postlasitaj de la ekspluataj klasoj en la historio estas anstataŭigitaj per la novaj socialismaj ideologio, kulturo, moroj kaj kutimoj, kiuj ĉiam pli profundiĝas en la koron de komunumanoj kaj senĉese kuraĝigas ilin marŝi antaŭen.

EN POLITIKA VESPERLERNEJO


Ĉiuvespere kadroj kaj komunumanoj de Hiaŭginguang duope aŭ triope venas al la politika lernejo ĉe la suda fino de la vilaĝo, starigita de la partia filio de la brigado por fari socialisman edukon.

Antaŭ la kultura revolucio, pro influo de la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki, la malnovaj ideologio kaj kulturo ankoraŭ havis sian merkaton. Tiam la amatora ensemblo tie prezentis nur malnovajn teatraĵojn, kiuj prikantis imperiestrojn, princojn, generalojn, ministrojn, inteligentajn sinjoridojn kaj belajn sinjoridinojn kaj propagandis supersticon kaj ĉasadon de feŭda gloro, riĉiĝo kaj

luksa vivo. Ankaŭ la libroj plenaj de la ideologio de la ekspluataj klasoj multe venenis nombron da gejunuloj.

En la Granda Proleta Kultura Revolucio, la kadroj kaj komunumanoj kritikis reviziismon kaj la ideologion de la ekspluataj klasoj, kaj samtempe, bone resuminte la antaŭajn spertojn kaj elĉerpinte la pasintajn lecionojn, la partia filio decidis gvidi la amasojn por batali kontraŭ la kapitalismaj spontaneaj fortoj, malnovaj ideologio kaj kulturo postlasitaj de la historio kaj prenis disvastigon de la novaj socialismaj ideologio kaj kulturo kiel sian gravan taskon. Por tia celo ĝi ekfunkciigis la politikan vesperlernejon.

En la lernejo, organizite de la partia filio la komunumanoj serioze studas marksismon, leninismon kaj verkojn de Prezidanto Maŭ, lernas kulturon, agrikulturan sciencan kaj teknikon. Krome ili faras kulturajn kaj sportan aktivadojn, kiel kanti revoluciajn pekin-operojn kaj kantojn, mem verki kaj prezenti artajn programerojn, tiel ke la lernejo fariĝis la centro de revoluciaj kulturaj aktivadoj en la brigado. Nun la kadroj kaj komunumanoj ofte diskutas pri problemoj en revolucio kaj produktado dum lecionaj horoj aŭ sur nigra tabulo kaj murgazeto. Ili kritikis kapitalismon kaj malbonan tendencan de damaĝo al interesoj de la kolek-



tivo, laŭdas progresintajn homojn kaj bonajn aferojn, por ke la novaj socialismaj ideologio kaj kulturo firme okupu la ideologian kaj kulturan pozicion en la kamparo. Ekzemple, en aŭtuna rikolto, iuj junuloj ne nur ne prenis sed piedpuŝis la maizospikojn kiujn oni perdis en transportado, dum iuj maljunaj kamparanoj prenis kaj portis ilin al la kolektiva draŝejo. Tuj post tio, sur la nigra tabulo de la lernejo ekaperis komento kun la titolo “Ĉu piedpuŝi aŭ preni?”, kiu laŭdis iujn, kiuj protektis laborfruktojn kaj amas la kolektivon kaj kritikis tiujn kiuj ne zorgis pri la interesoj de la kolektivo. Tio donis al gejunuloj grandan edukon.

En la pasintaj tri jaroj post sia fondiĝo, la lernejo ne nur disvastigis la novajn socialismajn ideologion kaj kulturon, sed ankaŭ altigis la teorian kaj kulturan nivelojn de la komunumanoj. Antaŭe multaj maljunaj kamparanoj estis analfabetoj, sed nun multaj el ili jam scipovas legi kaj skribi. Dank’ al tio formiĝis teoria vicaro el maljunaj, mezaĝaj kaj junaj komunumanoj. Ili ĉiuj havas socialisman konscion, laboras fervore, lernas diligente kaj partoprenas aktive en la produkta laboro. 12 el ili estis elektitaj kiel instruistoj-helpantoj de la

vesperlernejo. Ili edukas la komunumanojn per rakonto pri historioj de la vilaĝo kaj familioj kaj kritikas la sensencaĵojn de Lin Biaŭ kontraŭ la socialisma sistemo per profunda ŝanĝiĝo de la vilaĝo kaj feliĉa vivo de la komunumanoj. Ili ankoraŭ mobilizas la amasojn al kritikado pri reakciaj proverboj kaj malbonaj libroj de konfucianismo kaj la kompilado de rakontoj pri bataloj de la laboranta popolo kontraŭ Konfucio en la historio, tiel ke pli profunde kaj vaste kondukiĝas la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio en la brigado.

VILAĜO DE KANTOJ KAJ POEMOJ

Ĉiuj komunumanoj en Hiaŭginguang ŝatas kanti revoluciajn modernajn pekin-operojn kaj revoluciajn kantojn. Iliaj kantoj aŭdiĝas antaŭ aŭ post la kunveno, sur la vojo al kamplaboro aŭ ĉe la kamprandoj. Tie ne nur gejunuloj estas kantemaj, sed ankaŭ maljunuloj kun aĝo de 60-70 jaroj fariĝis “aktivuloj” en kantado de la revoluciaj modernaj pekin-operoj.

La komunumanoj ankoraŭ ŝatas verki poemojn kaj plurfoje okazigis deklaman konkurson. Iliaj poemoj estas ofte aperi-

*Nepre superos ni la virojn, ĉu en
Sargad' per ŝovelil', aŭ puŝ' de ĉaro.
Egalas al duonĉielo ja en
Malsamaj la epokoj virinaro.*

La partifilia sekretario Vang Zuoŝan laŭdis la komunumanojn ankaŭ versante:

*Spirito la Daĝaj-a l' montojn kaj ri-
verojn skuas,
En la brigado nia multas bravaj bata-
lantoj.
Kontraŭ frostec' kaj malfaciloj kam-
pojn ni konstruas,
Ho, ĉie flirtas ruĝaj flagoj kaj ekton-
dras kantoj.*

Tiuj poemoj vekis revolucionan optimismon ĉe la komunumanoj, kreskigis al ili laborenerĝion kaj akcelis la produktadon. La pomua produktokvanto de greno tie en 1974 kreskis pli-ol-3-oble kompare kun tiu en 1965.


NOVAJ KAMPARANOJ DE LA NOVA EPOKO

Dank' al disvolviĝo de diversaj politikaj kaj kulturaj aktivadoj, la spirita fizionomio de komunumanoj en Hiaŭginguang tute noviĝis, kaj sekve aperis multaj novaj homoj kaj aferoj.

En la pasinteco 53-jara komunumano Vej Venĝong tenis en sia koro nur la familian mastrumon sed malmulte la kolektivon. En la Granda Proleta Kultura Revolucio

li ege indigniĝis, aŭdinte la krimojn de Liu Ŝaŭki pri restaŭro de kapitalismo. Tio vekis lian doloran rememoron pri la malnova socio. Kiam li estis ankoraŭ naŭjara, li jam devis labori kiel dungito por riĉulo. Tiam li devis ellitiĝi frumatene kaj tuttage penlabori, tamen li eĉ ne povis sin satigi kaj vesti dike. Kiel oni povos toleri revenon de tia vivo! En la kritika kunveno li havis multajn vortojn por paroli, sed li ne povis bone esprimi tion, kion li volis diri. Pro tio li estis tre maltrankvila. Kiam en la vilaĝo fondiĝis politika vesperlernejo, li tuj sin anoncis por ĝin viziti. Li lernis tre diligente, kaj ĉiam klopodis por komprenigi sin pri nekonataj vortoj aŭ demandoj. Liaj gefiloj kaj kleruloj en la brigado ĉiuj fariĝis liaj instruistoj. Nun li ne nur scipovas legi, sed ankaŭ funkcias kiel instruisto-helpanto pri teorio. En la movado li kritikis Lin Biaŭ kaj Konfucion per memverkitaj poemoj. Li skribis multajn bonajn kritikajn artikolojn, el kiuj iuj estis jam publikigitaj en ĵurnaloj. Pro diligente en la lernado kaj zorgado pri la kolektivo li estis elektita de la komunumanoj kiel vicestro de la produkta grupo. Vej Venĝong ofte diris: "Ni kamparanoj devas ne nur produkti pli da greno kaj krei pli da riĉaĵo por la ŝtato, sed ankaŭ lerni diligente por okupi la kulturen pozicion en la kamparo, esti ĉiam pretaj kritiki la malnovajn ideologiojn kaj kulturon de la ekspluataj klasoj kaj disvolvi la novajn

Prezentado de propagandanto



socialismajn ideologion kaj kulturon, kaj fariĝi novaj kamparanoj de la nova epoko.”

En Hiaŭginguang pli kaj pli multiĝas komunumanoj kia Vej Venĝong. Ili energie lernas, ĉiam zorgas pri ŝtataj aferoj, amas socialismon kaj estas senegoismaj kaj helpemaj. Ju Fang estas estrino de la virina grupo de la unua produkta grupo kaj ĉiuj ŝiaj sep familianoj persistis en lernado dum la lastaj kelkaj jaroj. Ju Fang vizitis lernejon nur tri jarojn antaŭe, tamen ŝi lernis tre diligente en la vesperlernejo kaj akiris rapidan progreson. Ŝi tutkore servis al la kolektivo kaj iam gajnis la titolon de “modela KJL-ano” (KJL — Komunisma Junulara Ligo). Ŝia patro Ju Huajĝe estas membro de la teoria grupo de la produkta grupo por kritiki Lin Biaŭ kaj Konfucion. Li konstante helpas siajn familianojn en lernado. Ankaŭ ŝia patrino Guo Ŝumin liberigis sin de la dommastrumado, aktive partoprenis en lernado kaj kritikado, kaj ŝatas kanti revoluciajn modernajn pekin-operojn en la vesperlernejo. Ĉiuj membroj de la familio ofte diskutas pri gravaj aferoj de la ŝtato kaj la kolektivo, skribas kritikajn artikolojn kaj lernas versadon.

En la kuranta jaro Vang Tingkuan jam aĝas 72 jarojn. Krom la filo kiu laboras aliloke, restas hejme ankoraŭ tri membroj laborkapablaj kaj la vivo estas sufiĉe bona. Iuj admonis lin, ke li estas grandaĝa kaj devas multe ripozi kaj bone pasigi la lastan vivon. Li tamen diris: “Mia granda aĝo signifas ke al mi restas nemultaj jaroj, per kiuj mi povas labori por la revolucio, ĝuste pro tio mi devas labori pli energie.” En la lastaj kelkaj jaroj, ĉiufoje kiam la vetero malboniĝis nokte, la maljunulo ĉiam antaŭ aliaj ellitiĝis por bone ŝirmi la posedaĵojn de la kolektivo kontraŭ atako de la natura katastrofo. En ordinaraĵoj li ne povas sidi senfare kaj ĉiam kolektas sterkaĵojn por la brigado aŭ iras al kampoj por rigardi, ĉu ili devas esti sterkataj kaj sarkataj, kaj poste meminciate donas proponojn al la kadroj de la produkta grupo.

Ke komunumano Daj Julan edukis siajn infanojn per Maŭzedongpenso, tio ricevis laŭdojn de la amasoj. Foje, kiam ŝia sepjara filo Tieĝun revenis hejmen kun kelkaj ajloj, ŝi diris al la filo: “Prezidanto Maŭ instruas ke ni devas labori tutkore por la kolektivo. La ajloj estas riĉaĵo de la kolektivo kaj devas esti redonitaj al ĝi.” Kondukante la filon al la draŝejo ŝi redonis la ajlojn. Nun en Hiaŭginguang la infanoj portas ĉion kolektitan al la brigado.

NOVAJ KUTIMOJ KAJ MOROJ ANSTATAŬ LA MALNOVAJ

En la malnova Ĉinio la ekspluataj klasoj plenforte predikis la feŭdan superstiĉon kaj sian ideologion por firmigi sian regadon, sekve formiĝis multaj malnovaj moroj kaj kutimoj. La ŝtormo de la Granda Proleta Kultura Revolucio donis fortan atakon al la ideologio de la ekspluataj klasoj. Preĉipe en la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio la vastaj amasoj de komunumanoj en la kamparo faris profundan kritikon al la doktrinoj de Konfucio kaj Mencio. Tial la malnovaj ideologio, moroj kaj kutimoj estas anstataŭigitaj de la novaj. La ŝanĝiĝo de Hiaŭginguang estas la plej bona atesto pri tio.

“La viroj estas noblaj kaj la virinoj plebaj”, tio estis rigardata antaŭe kiel tre natura afero en Hiaŭginguang. Viro estis patriarko de la familio. Krom partopreno en kolektiva produkta laboro, virinoj ankoraŭ devis plenumi diversajn pezajn dommastrumajn aferojn. Laŭ malnova moro tiu, kiu havas pli da filoj, estis feliĉa, sed tiu, kiu havas pli da filinoj, estis malfeliĉa. Se virino ne naskis knabon, tio estis rigardata kiel bedaŭro kaj eĉ kaŭzis malpacigon en la familio.

Ekde la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la komunumanoj post lernado en la politika vesperlernejo ekkon-

sciis, ke la absurdaĵo distrumpetita plenforte de Konfucio “la viroj estas noblaj kaj virinoj plebaj” estas spirita kateno altrudita al homoj por defendi la interesojn de la ekspluatitaj klasoj. La epoko ŝanĝiĝis. Nun la viroj kaj virinoj estas tute egalaj. Kion la viroj povas fari, tion ankaŭ la virinoj povas. La komunumanoj kritikis la absurdan teorion de Lin Biaŭ kaj Konfucio pri malestimo al la virinoj per la kontribuoj, kiujn faris la virinoj de Hiaŭginguang en la revolucio kaj produkto. Nun virinoj laboras kiel gvidantoj sur ĉiuj niveloj de la partia filio kaj la revolucia komitato de la brigado ĝis la produktaj grupoj. Ĉiuj virinoj en la vilaĝo lernas en la politika vesperlernejo kaj aktive partoprenas en sociaj kulturaj aktivadoj. La virinoj estas grava forto ankaŭ en la produkta laboro. Geedzoj kune plenumas dommastrumajn aferojn, tio jam fariĝis nova moro en la vilaĝo. Kaj krome ĉiu familio praktikas laŭplanan infannaskon kaj la malfrua geedziĝo de gejunuloj estas kuraĝigata. Nun la komunumanoj liberigas sin el la malnova ideo ke pli da knaboj signifas pli da feliĉo kaj la viroj estas pli noblaj ol virinoj.

Antaŭe, kiam gejunuloj fianĉiĝis, la fianĉo devis doni al la fianĉino doton kiu inkluzivas vestojn kaj kontantan monon. En la vilaĝo 12 knabinoj jam akceptis tian doton, sed ili redonis ĝin en la movado de

kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, ekkonsciinte ke tio estas malnova moro kun karaktero de negoco pri virinoj, kiun postlasis la malnova socio. La partia filio de la brigado laŭdis ilian revolucian agon. Nun junulinoj jam ne postulas doton dum junuloj ne aranĝas luksan edziĝan ceremonion. Kiam knabino de Hiaŭginguang edziniĝas al junulo en alia vilaĝo, la brigado okazigas kunvenon por adiaŭi ŝin, en kiu oni laŭdas ŝiajn sukcesojn por kuraĝigi ŝin daŭre marŝi antaŭen. Kiam knabino de alia vilaĝo edziniĝas al junulo en Hiaŭginguang, la brigado aranĝas bonvenigan kunvenon, en kiu oni konigas al ŝi la staton de revolucio kaj produkto de la brigado kaj kuraĝigas ŝin aktive partopreni en politikaj, kulturaj kaj produktaj aktivadoj.

En tiu ĉi artikolo ni prezentis al niaj legantoj nur kelkajn fragmentojn de la politika vivo de la komunumanoj de Hiaŭginguang. Sed el tio oni nemalfacile trovis, ke post la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj en la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio okazas granda kaj profunda ŝanĝiĝo en nia kamparo.

**La pomua greno produktokvanto de 400 kg., kiun la brigado jam atingis nun, jam duobligis la normon difinitan de la ŝtato por la greno produktokvanto en regionoj norde de la Flava Rivero.*



Kritika kunveno en la familio de Guo Ŝumin

El Versaĵoj de Komunumanoj de Hiaŭginguang

VANG TING-JUE:

*Dank' al la Gvido de la Granda
Ĉina Kompartio*

*Irigaciaj kanaletoj densas kiel reto,
elektrofostoj en linio servas al la homoj,
maŝinoj ĉie instalitaj bruas en laboro,
ĉiu-vilaĝe ŝirmon donas novaj brikaj domoj.*

Pinŝiaĝongnong-oj laŭte kantas kun ĝojplena koro
sub ruĝaj flagoj, kiuj flirtas laŭ la melodio.
Jen la popola komunum' prezentas novan bildon
dank' al la gvido de la granda Ĉina Kompartio.*

* Malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj en la ĉina prononco.

VEJ JONGLI:

Legad' en Nokto

*Jam Oriono alte staras sur la firmamento,
en lampa lum' ankoraŭ legas iu kun atento.
Li studas zorge pripensante ĉiun el la vortoj,
tralegas li trifoje l' tekston sen dormema sento.
Remaĉ' de l' vortoj pli kaj pli akriĝas la okulojn,
tiel ke ili bone vidas ĝustan la linion,
kaj ankaŭ pligrandigas lian laborenergion
por nepre ŝanĝi la naturan fizionomion.
Portret' de Prezidanto Maŭ jen brilas en la lumo,
kaj kreskas por la Prezidanto lia korinklino.
L' instruajn vortojn li gravuras en la koron sian,
antaŭen marŝas kun la sun' matena en la sino.*

Sur la Longa Digo

*La longa dig' sin vestas per radia matenruĝo
 kaj belas poploj kaj salikoj sur ĝi en la frizo,
 interne de ĝi murmuradas ĉiam riverakvo,
 ekstere de ĝi disbloviĝas bonodor' de rizo.
 Aŭdiĝas sur la longa dig' jen tint' de sonoriloj,
 sinsekve, ho, ĉevalaj ĉaroj en kolono venas,
 klakadas vipoj kaj galopas vigle la tirbestoj,
 de gajaj ridoj de knabinoj ĉiu ĉar' plenplenas.
 Antaŭe eĉ herbaĉ' ne kreskas pro alkal' kaj salo
 ĉiloke, plagis inundado preskaŭ ĉiujara.
 Sed dank' al bona gvido de la Ĉina Kompartio
 jam en grenejon turnis sin la loko salalkala.
 Nun sur la longa dig' senfine fluas ĉar-kolono*

Studo de Filozofio en Kingian-brigado

HJUE NONG

EN profunda aŭtuno de la lasta jaro, ni vizitis Kingian-brigadon, en Giangŝan-gubernio de Ĝegiang-provinco. La unua objekto, kiun ni vidis en vilaĝo estis la frazo okulfrape pentrita sur la muro ĉe la enirejo. **“Liberigu la filozofion el la klasĉambroj kaj la libroj de filozofoj kaj faru ĝin akra armilo en la manoj de la amasoj.”** La akompananta funkciulo de la gubernio klarigis al ni ke la partia filio de Kingian-brigado ĝuste tiel faris laŭ ĉi tiu instrukcio de Prezidanto Maŭ, gvidante la amasojn al studo kaj uzado de filozofio, tiel ke la spirita fizionomio de la komunumanoj kaj la agrikultura produkto ambaŭ multe ŝanĝiĝis.

I

En la vespero, ni havis ŝancon viziti ĝian politikan vesperlernejon. Lecionon donis ĉirkaŭ 40-jara komunumanino Fu Ginmej. Surpaŝinte la estradon, ŝi diris: “Hodiaŭ mi parolos pri mia komprenaĵo post la legado de la libro *Kritiko de Gothaer-Programo*. Poste, ŝi kritikis laŭ la vidpunkto de Marks kaj lige kun la realo en la ĉina kamparo la absurdan teorion de Lassale ke “laboro estas la fonto de ĉiu riĉaĵo kaj ĉiu kulturo”.

Ŝi diris, ke Lassale, kiu parolis pri laboro kiel fonto de ĉiu riĉaĵo apartigante ĝin de la posedsistemo de la produktaj rimedoj,

*kaj vibras super ĝi la gaja kanta sonorado.
Por danki Prezidanton Maŭ pro la rikolto riĉa
patriotan grenon ni liveras ĝoje al la ŝtato.*

ĈEN HIANG:

*Ĉe Giangan-rivero Tondras jen
Batal-tamburo*

*Ĉe Giangan-rivero tondras jen batal-tamburo,
sterkplenaj ĉaroj en kolono hastas en veturo,
ruĝkvastaj vipoj instigadas la ĉevalojn fortajn
kaj l' veturiloj rapidegas fluge en konkuro.*

*Matene ellitiĝas ni kun steloj sur ĉielo,
vespere ni revenas hejmon en la luna helo.
Ni ja ne timas penon en la sterko-transportado,
ĉar ni deziras plibonigon de la patra tero.*

havis kaŝitan intencon. Oni rajtas demandi: Kiel la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj povus produkti grenon, ne havante agrojn kaj agrikulturajn instrumentojn? Kiel ili povus en tia situacio krei riĉaĵojn? Antaŭ la Liberiĝo, la vilaĝano Giang Ĉengliang laboris 29 jarojn kiel dungito, sed fine li restis ankoraŭ sola kun si sen edzino, haviginte al si nenian riĉaĵon. En la malnova socio estis diraĵo: “Kiu diligentas, tiu akiras.” Fakte, tio estis trompo, per kiu la ekspluatanta klaso kovris sian esencon de ekspluatado, atribuante

sian riĉecon al sia diligenteco kaj ŝparemo, kaj kalumnio atribuante la malriĉecon de la laboranta popolo al ties malŝparo kaj mallaboremo. Fakte, en la malnova socio, “kiu diligentis, tiu perdis”. Tiam ju pli la malriĉaj kamparanoj diligentis, des pli serioze la bienulo ekspluatistis. Kaj la laboranta popolo pli multe perdis, sekve, ankoraŭ pli mizeris. La radikala kaŭzo de la supre dirita fenomeno kuŝis en la privata posedsistemo de la produktaj rimedoj. Aparte de tiu fundamenta problemo, parolo pri tio ke “laboro estas fonto de ĉiu riĉaĵo kaj ĉiu



*Giang Ĵuvang kune
kun aktivuloj en
teoria lernado dis-
kutas pri historio
de la batalo inter
konfucianismo kaj
legalizismo.*

kulturo”, aŭ “kiu diligentas, tiu akiras” estas pura trompo por endormigi la laborantan popolon por ke ili ne leviĝu al revolucio. Sekve, tio estas reakcia... Ŝia ekspliko estis facile komprenebla, konkreta kaj vivplena.

Antaŭ dek jaroj, Fu Ginmej jam komencis studi filozofion kune kun la sekretario de la partia filio Giang Ĵuvang kaj ĝiaj aliaj membroj. Poste ĝi laboris kiel lernogvidulo por studo de filozofio en la produktgrupo. Antaŭ la Liberiĝo ŝi ne povis viziti lernejon pro malriĉeco de la familio, kaj legoscion ŝi akiris nur post la Liberiĝo. Kiam ŝi eklaboris kiel lernogvidulo en studo de filozofio, iuj mokis: “Se persono sen klereco povus fariĝi lernogvidulo, oni ne bezonus estonte viziti lernejon.” Aŭdinte tion, Ginmej tre indigniĝis, kaj ŝi decidis en si: mi nepre plenumu bone la laboron de lernogvidulo por studo de filozofio, klereco estas konkerebla per diligenta penado! Dum multaj jaroj, ŝi serioze klopodis en lernado, kombinante la teorion kun la praktiko kaj rapide progresis. Ŝi estas elektita kiel estro de la Virina Ligo de la brigado kaj lernogvidulo de la politika vesperlernejo, iafaje eĉ estis invitita al la gubernia urbo aŭ la ĉefurbo de la provinco por fari prelegon.

II

La komunumanoj de Kingian-brigado ne nur studas la filozofion en la politika vesperlernejo, sed ankaŭ ofte diskutas proble-

mojn renkontitajn en la ĉiutaga vivo laŭ filozofia teorio.

En printempo de la lasta jaro, kiam Maŭ Amej aŭdis ke Jan Fangjing atribuas la mizeran vivon antaŭ la Liberiĝo al la destino de la sorto, ŝi lernis kune kun la lasta kaj kritikis la ideisman “antaŭdestinismen”. Antaŭ la Liberiĝo, perdinte siajn gepatrojn jam en sia infana aĝo, Jan Fangjing multe suferis mizerecon kaj tre sopiris al pli bona vivo post sia edziniĝo. Sed la familio de la edzo estis eĉ pli mizera. Oni diris, ke tio estis destinita de ŝia sorto kaj neŝanĝebla; kaj ankaŭ ŝi mem tiel kredis. Tamen post la Liberiĝo, la laboranta popolo liberiĝis el ekspluato, kaj ankaŭ ŝia familio ne plu havas zorgon por manĝaĵo kaj vestaĵo. Ŝia filo eĉ havas eblon viziti universitaton. Per tiuj faktoj Amej klarigis al Fangjing, ke la mizeron de la popolo antaŭ la Liberiĝo kaŭzis la ekspluatado fare de la bienulo kaj kulako, kiuj trompis la popolon per “antaŭdestino” por ke ĝi senfare toleru ilian ekspluatadon anstataŭ batali kontraŭ ili. Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio tute ne kredas “antaŭdestinon”, sed faras revolucion kondukante la malriĉulojn al batalo por faligi la bienulojn. Nur dank’ al tio la popolo akiris la hodiaŭan feliĉan vivon! Nur se oni kredas al la revolucio, oni povas kritiki la teorion de “antaŭdestino”, kaj liberigi personon por fari la revolucion. Aŭdinte tiujn klarigojn de Amej, Jan Fangjing ekkomprenis la devenon de “antaŭdestino”

En lernado



Komunumanoj legas en biblioteko.



kaj ĝian rilaton kun la revolucio. En kritikado al “antaŭdestinismo” de Konfucio kaj Lin Biaŭ, ŝi diris: “Nia nuna feliĉa vivo ne estas rezulto de boniĝo de nia sorto, sed tiu de la ŝanĝo de la socia sistemo. Ni do ne kredis al antaŭdestino, sed ĉiam sekvis Prezidanton Maŭ por fari revolucion.”

En la brigado ni plie aŭdis multajn rakontojn pri batalo kontraŭ la naturo kaj disvolvado de la agrikultura produkto per la apliko de la filozofiaj pensoj de Prezidanto Maŭ.


En aŭtuno de 1967, la brigado suferis grandan sekecon, en la akvorezervejo kaj lagetoj ne troviĝis akvo, la rizkampoj sekiĝis kaj la rizplantoj velkis. Iuj pretis formigrigi aliloken por trovi vivrimedon, kaj maljunuloj atendis helpon de la ŝtato. La partia filio de la brigado studis la situacion kaj decidis eduki la amasojn por venki la sekecon per la filozofiaj pensoj de Prezidanto Maŭ.

En mobiliza kunveno, vicsekretario de la partia filio Daj Hiangmej diris: “Antaŭe nia loko estis tre malriĉa, tio estis malbona afero; sed la malriĉeco instigas al ŝanĝiĝo. Dank’ al diligenta laborado en la lastaj jaroj ni akiris sinsekvajn riĉajn rikoltojn. La malbona afero tiel ŝanĝiĝis en bonan aferon. Poste ni neglektis la akvomastroman konstruadon, nun okaze de sekeco la bona afero denove turniĝis en malbonan aferon. En la hodiaŭa kunveno ni diskutos

kiel ni ŝanĝu la nunan malbonan aferon en bonan.” Tuj poste, la lernogvidulo kondukis komunumanojn legi la instrukcion de Prezidanto Maŭ: “Ni devas scipovi rigardi problemojn plenaryplekse, ne nur la pozitivan flankon, sed ankaŭ la negativan flankon de aferoj. Sub specifaj kondiĉoj, malbona afero povas konduki al bonaj rezultoj, dum bona afero ankaŭ povas konduki al malbonaj rezultoj” Giang Ĵuvang faris analizon lige kun la stato de la brigado dirante: “La sekeco kaj manko de pluvo estas kontraŭdiraj al nia terkulturo, en tiu paro da kontraŭaĵoj la ĉefa estas en nia flanko, se nur ni persistu en batalado kontraŭ la sekeco, nepre eblas al ni akiri bonan rikolton.” Ankaŭ la komunumanoj opiniis: Se oni nur disvolvas la spiriton sinapogi sur la propraj fortoj kaj peneme luktadi en malfaciloj, kaj persiste batalas kontraŭ la sekeco, oni certe povas ŝanĝi la malbonan aferon en bonan aferon.

La penso pri ŝanĝebleco de malbona afero en la bonan firmigis la decidemon de la amasoj por venki la sekecon kaj ĉiuj sin ĵetis en la laboron kontraŭ la sekeco. Oni portis akvon de loko 1.5 kilometrojn fore por semi tritikon. Post diligenta laborado dum 30 tagoj sur kampo de pli ol 200 muoj ekaperis verdaj tritikaj plantidoj. En vintro de la jaro, ili konstruis lagetojn kaj akvokonservejon kaj fosis kanalojn por solvi la irigacian problemon de agrikulturo. Somere en la sekvinta jaro estis akirita riĉa rikolto

*Legi murgazeton kun
filozofiaj artikoloj*



*Junuloj de la scienca kaj teknika grupo de la brigado en
eksperimenta rizkampo*



de tritiko kies kvanto superis la propran bezonon, kaj oni liveris al la ŝtato parton el ĝi por subteni la konstruadon. La komunumanoj ĝoje diris: “Lerninte materiisman dialektikon, oni havas pli grandan fidon por batali kontraŭ la naturo. En la katastrofa jaro estas akirita riĉa rikolto de tritiko; malbono turniĝis en bonon.”

III

Fariĝis jam moro ĉe la komunumanoj de la nomita brigado studi filozofion kaj uzi la lernitaĵojn en ĉiutaga vivo. Nu, kiel tio komenciĝis?

Antaŭ dek jaroj, nemalmultaj komunumanoj de la brigado proponis tiam kolektive bredi fiŝojn en la lagetoj de la brigado. Sed, iuj komunumanoj tion ne aprobis kaj opiniis ke oni prefere luigu ilin al komunumanoj por bredi fiŝojn private. La du opinioj ne povis unuigi post ripetada diskutado, kaj, iuj estroj de produktgrupoj decidis luigi lagetojn al komunumanoj por bredi fiŝojn private.

En somero de 1964, dum periodo de pli ol unu monato tute ne falis pluvo kaj la rizplantoj estis minacataj de la sekeco. Tiam la estroj de produktgrupoj volis uzi la akvon de la lagetoj, sed, la fiŝbredantoj ne konsentis dirante: “Vi konsentis al ni bredi fiŝojn en la lagetoj, nun vi volas uzi la akvon, ĉu tio ne mortigos niajn fiŝojn?” En pluraj produktgrupoj okazis tia kontraŭdiro, kaj oni venis al la partia filio de la brigado por solvi ĝin. Giang Ĵuvang kaj aliaj membroj de la partia filio opiniis ke oni devas unue uzi la akvon por irigacii la kampojn, sed ili ne povis konvinki la fiŝbredantojn. Tiel, la kampoj estis irigacitaj per la akvo, tamen la kontraŭdiro inter la kadroj kaj fiŝbredantoj de la koncernaj produktaj grupoj pli akriĝis.

La kamaradoj de la partia filio diskutis pri la afero. Antaŭe ili ĉiam opiniis ke malfaciloj kaj kontraŭdiroj en laboro estis kaŭzita de nesufiĉa disvolviĝo de la kolek-

tiva ekonomio kaj malrapida leviĝo de la vivnivelo de la komunumanoj, kaj ke ili malmultiĝos kiam la produkto disvolviĝos, kaj la vivo pliboniĝos. Sed, nun, meznombra pomua produktokvanto de greno kreskis de 150 kilogramoj en la komenco de la Liberiĝo ĝis 400 kilogramoj nun, el kio la vivnivelo de komunumanoj ankaŭ leviĝis. Kial do nun troviĝas ankoraŭ tiom da kontraŭdiroj? Giang Ĵuvang kune kun aliaj membroj de la partia filio komencis studi filozofian verkon de Prezidanto Maŭ *Pri Kontraŭdiro*.

Tra studado kaj diskutado, ili ekkonis, ke la ĉefa inter la multnombraj kontraŭdiroj de la brigado estas tiu inter socialismo kaj kapitalismo, nome kontraŭdiro inter la intereso de la kolektivo uzi la akvon por irigacio kaj tiu de privatuloj uzi ĝin por bredi fiŝojn, t.e. kontraŭdiro inter solidigo kaj disvolvado de socialisma kolektiva ekonomio kaj malfortigo de ĝi. Post ekkono de tiu ĉefa kontraŭdiro, multaj antaŭe nesolveblaj problemoj fariĝis solveblaj unu post alia. Tiel la partia filio komencis inter la komunumanoj edukadon pri la ekzisto de du vojoj socialisma kaj kapitalisma, kritikadon al la kapitalisma tendenco, persistado pri la socialisma direkto, fortigo kaj disvolvado de la kolektiva ekonomio.

Tra la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, studado kaj aplikado de la filozofio jam fariĝis amasa movado en la brigado. Nun, tie formiĝis taĉmento konsistanta el 109 kadroj kaj komunumanoj, sinokupantaj pri teorio. Ili studas marksismajn-leninismajn verkojn kaj tiujn de Prezidanto Maŭ, verkas revoluciajn kritikajn artikolojn kaj laŭvice prelegas en la politika vesperlernejo de la brigado. La malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj ĝoje diras: “Ni ne nur povas bone lerni la reflektan teorion de materiismo, sed ankaŭ scipovas kritiki ideisman transcendentismon por ke marksismo kaj leninismo okupu ĉiujn terenojn de la superstrukturo.”


Fiŝista Vilaĝo ĉe Marbordo

LASTATEMPE ni vizitis Longhjudau, kiu situas ĉe la piedo de la Kabo Ĉengŝangiaŭ de Giaŭdong-duoninsulo de Ŝandong-provinco kaj sur la grava akva vojo al Bohaj-golfo por la Orienta Ĉina kaj la Flava Maroj. La loko proksima al fiŝkaptejo rigardas al la maro de unu flanko kaj estas ĉirkaŭata de montoj en la aliaj tri flankoj kaj servas kiel bona natura fiŝhaveno. Pro sia strategia graveco la loko estis okupita de la japanaj agresantoj en la tempo de la Kontraŭjapana Rezistmilito. Tiam la fiŝistoj vivis ekstreme mizeran vivon sub la premado de la japana imperiismo kaj la lokaj fiŝtiranoj. Sur sia boato ili tutjare fiŝkaptis sur la senlima maro. Kaptite de ŝtormoj, multaj el ili estis englutitaj de la maro kaj fariĝis nutraĵo de fiŝoj. En Longhjudau vidiĝis tiam nur dezertaj sablaj bordetendaĵoj kaj kadukaj kabanoj. En vintro kaj somero kiam ventegoj blovis de la sudoriento, grandaj ondoj furiozis en la tuta haveno. Por ke la boatoj ne estu detruitaj de la ondoj, la

fiŝistoj devis tiri ilin unu post alia sur la bordon. En la jaro 1948 uragano detruis pli ol 100 fiŝboatojn. Tial konstrui en la haveno grandan digon kontraŭ ventoj kaj ondoj estis dezirego de la tieaj fiŝistoj jam de multaj generacioj.

La nuna Longhjudau estas nekomparebla kun la antaŭa. Post la Liberigo sub la gvido de la Partio la fiŝistoj suriris la vojon de kooperativigo, fondis fiŝkaptan brigadon kaj multe progresigis la fiŝkaptan produkton. Precipe en la Granda Proleta Kultura Revolucio pli ardis la socialisma laborentuziasmo de la fiŝistoj kaj novaj fizionomioj de la konstruado de la fiŝhaveno prezentiĝis en ĉiu tago. Kun Daĝaj kiel ekzemplo, disvolvante la spiriton de sinapogo sur la propraj fortoj kaj penado en malfaciloj, ili konstruis en tri jaroj grandan digon kun longeco de 300, larĝeco de 20 kaj alteco de 14 metroj, per ŝtonoj prenitaj de la montoj. De tiam Longhjudau fariĝis kvietaj kaj

Ekveturi por kapti fiŝojn



sekura haveno. En la interna flanko de la digo la fiŝistoj konstruis kaj mekanikigis la el- kaj en-ŝarĝon de fiŝoj, akvo kaj brulaĵo.

En la brigada ŝipriparejo ni vidis ke dekelkaj fiŝistoj intense okupas sin pri farado de la korpoj de du fiŝŝipoj. La respondeculo de la brigado Li Ĉunji klarigis al ni: "Nun ni konstruas ŝipojn kun 135 ĉevalpovoj, escepte de la ĉefa maŝino ĉiujn aliajn partojn de la ŝipoj ni mem fabrikos." La ŝipriparejo estis fondita sur la bazo de riparista grupo, kiu kapablis nur fari simplajn riparojn kun malmultaj laboriloj kaj unu forno. Poste la ŝtato provizis ĝin per kelkaj ilmaŝinoj kaj samtempe ili mem faris nombron de ekipaĵoj sin apogante sur la propraj fortoj kaj la kolektiva saĝo. Nun ili jam kapablas ankaŭ konstrui ŝipojn. En la lastaj jaroj ili faris entute 58 motorŝipojn; tiel la brigado jam mekanikigis la fiŝkaptadon. Tio estas vere nefacila afero por brigado kun nur pli ol 500 membroj.

Krom tio la brigado plie funkciigas malgrandan elektrejon kaj fondis bredejon kun pli ol 1,000 lutreoloj kaj kultivas 500 muojn da laminario. Ĝia jara marprodukto jam atingis 7,000 tunojn. La meznombra enspezo de komunumanoj kreskis per 80% kompare kun tiu de 1965. Krome la brigado pagas kuracadon por la komunumanoj, kaj garantias la vivon de maljunaj komunumanoj perdintaj laborkapablon. En la loko la ŝtato

fondis por la fiŝistoj magazenon, lernejon, hospitalon kaj kinejon. Tamen pli profunda ŝanĝiĝo de tiu fiŝista vilaĝo elmontriĝis en la spirito de la komunumanoj. En tiu regiono estas vaste konataj iliaj senegoisma spirito kaj bona stilo de helpemo. Pri tio ni aŭdis multon de la fiŝistoj el aliaj lokoj.

En printempa fiŝsezono, ĉiujare, multaj alilokaj fiŝŝipoj venis kapti fiŝojn en la fiŝejo proksima al Longhjudau kaj ofte haltis en la haveno por elŝarĝi sin per kaptajo kaj provizi sin per akvo kaj brulaĵo. Kvankam la kajon konstruis la Longhjudau-aj fiŝistoj por si mem, tamen ili lasis ĝin uzi libere ankaŭ de alia. Al ĉiu ajn fiŝŝipo el alia loko, kies helico okaze estis implikita en reto, ili ĉiam aktive helpis subakve por malobstrukci ĝin. En plej okupata fiŝsezono, ilia ŝipriparejo neniam rifuzis riparpetojn de alilokaj ŝiparoj, eĉ kiam ĝi havis riparlaborojn por la propra brigado.

En la lastaj jaroj, nemalmultaj lokoj laŭ la mara bordo de nia lando disvolvis la fiŝkaptan produkton, starigante fiŝŝiparojn. Oni ofte petis la fiŝistojn de Longhjudau helpi ilin per gvidado en fiŝkaptado sur la maro. La Longhjudau-aj fiŝistoj ĉiam volonte donis helpadon, opiniante ke la kontribuo de unu fiŝkapta brigado estas limigita kaj malgranda, kiel ajn lerta ĝi estas en fiŝkaptado; nur kiam ĉiuj fiŝkaptaj brigadoj povas kapti multe da fiŝoj, la kontribuo fariĝos sufiĉe granda. En la lastaj kel-

Fiŝista vilaĝo en Longhjudau




kaj jaroj ili donis helpojn al fiŝŝipoj el la provincoj Ŝandong, Hebej, Liaŭning kaj Giangsu, sendante al tiuj siajn ŝipojn, kiuj havas plej altan produkton, por servi kiel ties gvidŝipoj, aŭ la teknike plej spertoriĉajn ŝipestrojn kaj unuajn maatojn por komuni-ki siajn spertojn. Ĉiufoje post trovo de bona fiŝejo ili enmarigis la fiŝreton nur post kiam aliaj frataj brigadoj jam aranĝis sin por kaptado. Kaj ĉe reveno de la maro, por trovi ŝirmejon kontraŭ uragano, por proviziĝo de brulaĵo kaj glacio ili ĉiam restis ĉe la vosto por cedi la oportunon al aliaj. Foje ili laboris sur la maro kaj trovis ke de-flosantaj fiŝretoj alkroĉiĝis al ilia fiŝreto. Laŭkutime ili rajtas detranĉi ilin por sekurigi la sian. Tamen, kun alte levita konscio dank' al la eduko de la Granda Proleta Kultura Revolucio, ili ne tiel faris. Ili uzis tutan tagon por malimpliki pacience la alkroĉiĝintajn fiŝretojn kaj sunumi kaj ordigi ilin sur la marbordo kaj poste redonis ilin al la perdintoj kaj eĉ la valoron de 1,000 kilogramoj da fiŝoj kaptitaj en la retoj.

La senegoisman spiriton ili elmontris ankaŭ en la zorgado pri la tuto kaj konscia submeto de siaj propraj interesoj al la revoluciaj bezonoj. Por savi klasajn fratojn ili eĉ ne zorgis sian propran vivsekuron.

Iun fojon la meteologia stacio antaŭsciigis pri alveno de tajfuno. Ili tiam jam rikoltis sian laminarion kaj restis al ili nur la dudek mil flogloboj restantaj ankoraŭ sur la maro. Tiutempe la najbara fiŝkapta brigado Luofengging ankoraŭ havis 50 muojn da laminario nerikoltita. Por sekurigi la laminarion de la frata brigado, la partia filio de Longhjudau senhezite sendis siajn boatojn por helpi la rikoltadon. Dank' al tio ties laminario kun valoro de 80,000 juanoj estis elmarigita antaŭ la alveno de tajfuno, tamen flogloboj estis forblotitaj de la tajfuno. La fiŝistoj de Luofengging kun granda elkora danko volis rekompensi ilian damaĝon. Sed la respondo estis: "Ambaŭ niaj brigadoj estas partoj de unu granda kolektivo en disvolvado de marprodukto. Forcedi la malgrandan por sekurigi la grandan estas bezono de la revolucio. Liveri pli da laminario al la ŝtato estas nia komuna tasko."

Alian fojon kiam la fiŝŝipo n-ro 9 de Longhjudau ankriĝis ĉe enirejo de la haveno de Laŭhutan, subite ŝtormo leviĝis sur la maro. La furiozaj ondegoj danĝere atakis la ŝipojn ĉe la haveno, ĵetante ilin jen alten jen profunden. Ili rimarkis ke 50 metrojn fore du velŝipoj el Fuhian-gubernio estis jam de-



Riĉa rikolto de salikokoj

truitaj kaj ties poŭpoj jam komencis subakviĝi kaj la fiŝistoj sur la ŝipoj pene baraktis kontraŭ la ventego kaj ondegoj por sin savi. Dume ili mem ankaŭ troviĝis en malfacila situacio, ĉar fronte furiozis la ventego kaj ondegoj kaj malantaŭe estis danĝeraj rifoj. Sed ili unue pensis pri la sekureco de la klasaj fratoj. Ŝipestro Li Ensong direktis la motorŝipon antaŭen kun siaj kamaradoj renkonte al la ventego kaj ondoj kaj fine elsavis la 16 fiŝistojn sur la dronantaj ŝipoj. En tiu momento, maldekstre de ili kvar aliaj velŝipoj troviĝis en danĝero de kablrompiĝo kaj renversiĝo, kaj la 14 fiŝistoj troviĝintaj sur la ŝipoj povus esti en ĉiu momento englutitaj de la ondegoj. Kvankam la ŝipanoj sur la motorŝipo n-ro 9 preskaŭ tute eluzis sian lastan forton kaj krome iuj el ili estis vunditaj. Sed ili ekpensis, ke en tia okazo tempo signifas vivon, kaj tuj faris decidon alproksimiĝi al la velŝipoj. Post intensa batalo dum pli ol unu horo ĉiuj 14 fiŝistoj sur la pereontaj ŝipoj estis elsavitaj. Tiuj heroismaj kaj sinoferaj agoj de la fiŝistoj de Longhjudau impresis multajn kaj varme laŭdataj de ĉiuj.

Heroaĵoj de Tibetana

Komunisto BUDE

BUDE estas sekretario de la partia filio de Lasi-komunumo de Baking-gubernio en norda Tibeto.

En 1959, dum la granda revolucio, en kiu la tibeta popolo renversis la reakcian kaj sovaĝan servutan sistemon, la juna Bude brave batalis kontraŭ la naciperfida kliko de Dalai kaj gajnis venkon. Pro tio li estas honore nomata de la tieaj popolanoj la "aglo super stepo". Dum la lastaj 15 jaroj, kiam rapide disvolviĝis la tibeta historio, Bude vigleplene konstruas la socialisman novan Tibeton, kune kun miliona liberigita servutularo.

NEFLEKSEBLA BRAVULO

En la komenco de la jaro 1959, kiam la naciperfida kliko de Dalai lanĉis delonge kovitan armitan ribelon, Bude estis laboristo de forstokulturejo Hongki de Baking-gubernio. Pli ol 200 naciperfidaj banditoj sieĝis la kulturejon kaj ĝiaj laboristoj kaj oficistoj persiste batalis kontraŭ ili jam unu tutan tagon. Laŭ la komisiono de la gvidantoj de la kulturejo, kun letero en la sino Bude ekiris en la nokto tra la sieĝo de la malamikoj por peti urĝan helpon de la supera instanco. Estis malfeliĉe, ke li falis en la manojn de la banditoj sur la vojo.

Konsiderante, ke ne estas eble por li transdoni la leteron, li dismaĉis kaj englutis ĝin por teni la sekreton de la Partio. Kiam li preskaŭ estis fingluta ĝin, la banditoj tion ekrimarkis kaj kruele torturis lin, por informiĝi de li, kiom da homoj kaj pafiloj estas en la kulturejo. Bude rifuzis respondi, tiam la banditoj pende levis kaj fortege vipadis lin. Fine ili ligis lin al ĉevalo, por ke ĝi kurante trenu lin sur la tero. Grave vundiĝinte Bude svenis.

Ĉiaj kruelaj torturoj tamen ne povis elpremi ian respondon de Bude, la nefleksebla heroo. La sovaĝaj banditoj ligis lin sur foston kaj minace demandis: "Respondu, kiom da homoj kaj pafiloj havas la kulturejo? Al kiu flanko estas via korinklino?" Bude solene respondis: "En la kulturejo estas multaj homoj kaj pafiloj! Mia koro ĉiam inklinas al la Kompartio, kiu klopodas liberigi la tibetan popolon!" Apenaŭ li finparolis, 7-8 banditoj kolere sin ĵetis al li kaj elkavigis liajn okulglobojn. En palpebrumo Bude sentis malheliĝon antaŭ la okuloj kaj teruran doloron, kiu lin turmentis. Grince premante siajn dentojn, Bude riproĉis la malamikojn. La sovaĝaj bestuloj enverŝis la varmigitan kremon en liajn okulglobojn kaj li denove svenis.

La multe suferinta sklavo Bude havas obstinan vivforton. Kiam li rekonsciigis, la Popola Liberiga Armeo jam forpelis la banditojn kaj Bude elsaviĝis.

Kvankam la okulgloboj de Bude estis senigitaj de la damnindaj naciperfidaj banditoj, tamen la brilo de la Partio ĉiam lumigos lian menson. Li diris: "Sen okuloj mi tamen havas orelojn por aŭskulti vortojn de la Partio, manojn por partopreni en la revolucio kaj krurojn por iri la socialisman vojon." Depost kiam li perdis siajn okulojn, li revenis de la forstokulturejo al sia hejmloko kaj estis elektita de la samlokanoj kiel estro de Lasisubgubernio. Por pli bone servi al la liberigitaj servutuloj li decidis sin hardi.

Komence li piediris kondukate de helpanto, kaj poste li mem iris palpante. Li tiel vizitis la tutan subgubernion. Iajoje, li falis, eĉ falis en riveron, aliafoje liaj vestoj ŝiriĝis. Malgraŭ tio,



li per obstina volo persistis en la trejnado. Fine li bone konis ĉiujn montvojetojn kaj ĉiujn jurtojn per palpado.

Por sin trejni en irado, foje, post ĉeesto de kunveno en Longsanggoŭ, li insistis, ke li mem revenu hejmen. Li malfacile trapasis la zigzagan montvojeton kaj ricevis multajn kontuzojn sur la korpo. La najbaroj tre kompatis lin kaj zorgeme demandis, kial li ne petis iun rekonduki lin. Bude kun rideto respondis: “Mi volas ĝuste tiel min hardi!”

Dank’ al diligenta trejnado, Bude nun ne nur povas iri piede aŭ rajde al proksimaj lokoj, sed ankaŭ falĉi sekalon kaj tondi lanon, palpante. Rajdante sur sia blanka ĉevalo li ĉie iras tiel en vento kiel en pluvo por gvidi la vastan paŝtistaron antaŭen sur la larĝa socialisma vojo.

SURPAŜO SUR LA ORAN PONTON DE SOCIALISMO

La Granda Proleta Kultura Revolucio havigis al la tibetaj vilaĝoj kaj paŝtejoj grandan ŝanĝiĝon kaj levis altan tajdon de la socialisma reformo en la tuta paŝtista regiono. Kiam okazis la Naŭa Kongreso de la Partio en 1969, la stepo de norda Tibeto ekbolis de ĝojo, kvazaŭ la floro Gesang sim-

bolanta belan revon por la tibeta popolo, la popola komunumo aperis tra la tuta altebenaĵo.

La paŝtistoj sinsekve venis al la hejmo de Bude kaj diris al li: “La ora brilo de la popola komunumo jam venis ĝis nia loko. Bude, kiam vi gvidos nin por komenci la aferon?”

La entuziasmaj vortoj de la klasaj fratoj tre varmigus lian koron. Li respondis: “Prezidanto Maŭ jam antaŭlonge instruis al ni: ‘**Nur socialismo povas savi Ĉinion.**’ Ni nepre konstruos la oran ponton — la popolan komunumon, profunde en la stepo, solida kiel Tanglamontaro.”

La klasaj malamikoj havas ĝismortan malamon kontraŭ popola komunumo. Aŭdinte ke Lasi fondos ĝin, ili ĉie semis kalumniojn, asertante ke la popola komunumo “ne povos longe ekzisti”. Bude diris decideme al la paŝtistoj: “La subfosado de la malamikoj neniel povas bari nian antaŭenmarŝon, kaj ni definitive iros la oran vojdon de popola komunumo.”

Iun tagon malriĉa paŝtisto Jongĝengacu sciigis al Bude, ke post kiam la amaso malkovris la kalumniojn faritajn de la reakcia eksmastro de paŝtistoj Dian-giegele, pro timo tiu ŝtele forportis el sia hejmo sian sekretan kontolibron al Gejing-monto por kaŝi ĝin, kiun li konservas por rekalkuli la kontojn kun la liberigitaj servutuloj en la estonteco, Bude ekflamiĝis de indigno kaj tuj petis Jongĝengacu konduki lin al la kaŝloko sur la monto, kaj fine ili elfosis el sub iu roko la kaŝitan kontolibron. Tiu sensacio multe skuis Erdanggoŭ. La liberigitaj paŝtistoj de la tuta subgubernio alrapidis partopreni en la kunveno por malkovri kaj kritiki la intrigojn de tiu reakciulo celantajn restarigon de la servuta sistemo. La klasa batalo akriĝis la okulojn de la amasoj, levis ilian konscion kaj plifirmigis ilian decidon por fondi la popolan komunumon.

En novembro de 1970, venke naskiĝis en Bakinggubernio la Lasi-a popolkomunumo en la ŝtormo de klasa batalo. La komunumanoj unuvoĉe elektis Bude kiel estron de la revolucia komitato de la komunumo.

“SERVI KIEL GRUNTBOVO AL LA LIBERIGITAJ SERVUTULOJ”

Pro la komunaj travivaĵoj en la malnova socio Bude kaj la malriĉaj paŝtistoj starigis inter si profundan klasan amikecon. En la malnova socio, en sia aĝo de ok jaroj Bude paŝtis ŝafojn por mastro de paŝtistoj kaj ĉiam suferis de malsato, malvarmo kaj persekutado. Antaŭ ol li atingis 20 jarojn li jam estis trifoje sendita de la mastro al malliberejo. Same kiel Bude, la malriĉaj paŝtistoj de Lasi ĉiuj havas familian historion plenan de larmoj kaj sango. Tiam ili vivis mizeran vivon, “matene serĉante nutraĵon kiel kokoj kaj nokte serĉante dormejon kiel birdoj”. Sub la gvido de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, Bude kaj liaj samlokanoj liberigis el ekspluato kaj subpremo kaj ilia vivo pli kaj pli boniĝis. Bude diris: “Por socialismo, mi volonte servos kiel gruntbovo al la liberigitaj servutuloj dum la tuta vivo.”

Lasi-komunumo konsistas el 9 produktaj brigadoj kun 183 familioj kaj pli ol 800 loĝantoj,



kiuj dise loĝas en du montvaloj. Preskaŭ en ĉiu familio, Bude postlasis siajn piedsignojn. Se iu familio sin trovas en malfacilo, Bude ĉiam iras tien kun ĝustatempa helpo.

Venis vintro. Bude iris al la hejmo de la maljuna tenisto de la kvina brigado senparenculo Zala kaj palpis lian vestaĵon. Kiam li trovis, ke Zala ankoraŭ portas sur la piedoj ŝuojn por varma sezono dum neĝado, li tuj elpoŝigis novajn peltŝuojn kaj metis ilin en la sinon de Zala.

Iun someran vesperon de 1970, furioza ŝtormo atakis stepon Adang kaj abrupte ŝveligis la riveron. Baĝu, la filo de malriĉa paŝtistino Mogo, iris serĉi raŭpoherbojn (*cordyceps sinensis herbo paratite kreskanta sur korpo de raŭpo, kiun ĉinoj nomas “vintre raŭposomere-herbo” kaj uzas en medicino*), kaj ankoraŭ ne revenis. Pro tio Mogo tre maltrankviliĝis. Ŝi pensis: Plej bone estas iri al Bude, li certe donos helpon. Tuj ekster la jurto ŝi jam renkontis Bude kaj vicedstron de la brigado Gjueze. Antaŭ ol Mogo ekparolis, Bude diris: “Trankviliĝu,

oni jam informis ĉion al mi kaj ni tuj iros serĉi lin.” Gjueze kaj Mogo konsilis al Bude ke li ne iru, ĉar pluvos kaj la vojo estas glitiga. Tamen Bude insiste tiris Gjueze por iri al la riverbordo sub pluvo. Tion vidinte, Mogo ekmemoris la pasintan travivaĵon. En iu pluvega tago antaŭ 24 jaroj, same kiel nun, ŝia sepjara infano Kaercijen estis vipe pelita de la mastro Jongzong el la jurto por serĉi lian perditan gruntbovon. Trapasante la ponteton malgranda Kaercijen falis en Erdangriveron kaj dronis en torentantaj ondoj. La gruntbovo revenis, sed ne la filo de Mogo. Pri tio la kruela mastro diris eĉ nenion konsolan. Post nelonge ankaŭ ŝia flineto dronis en la rivero pro manko de zorganto. Sub la reakcia feŭda servuta sistemo Erdangrivero jam forglutis du infanojn de Mogo. Nun Bude,

perdinta vidkapablon, iris serĉi ŝian infanon en pluvo. Kiel ŝi povis ne emociĝi, komparante la du malsamajn sociojn.

En la granda pluvo Bude kaj Gjueze transpenis mano en mano la ŝvelintan riveron Erdang kun akvonivelo ĝis ilia brusto kaj kelkfoje falis puŝate de la fluo. Kiam ili atingis la elektrejon en la transa bordo, ili trovis ke la laboristoj jam akceptis la knabon en la elektrejon kaj la lasta endormiĝis sub ilia zorgo. Ili ambaŭ revenis en la sama nokto por informi tion al Mogo. Sciinte ke la infano estas en sekuro, Mogo emocie prenis la manon de Bude kaj foje-refoje dankis la Komunistan Partion kaj Prezidanton Maŭ kaj laŭdis la noblan spiriton de Bude kaj Gjueze zorgi la amason.

Nun Bude funkcias ne nur kiel sekretario de la partia filio kaj estro de la revolucia komitato de Lasi-komunumo, sed ankaŭ kiel konstanta membro de la gubernia komitato de KPĈ de Baking kaj membro de revolucia komitato de Nakju. Li

ofte diris: “La Partio kaj klasaj gefratoj konfidas min, do mi devas tutkore kaj konsciencie labori por ili. Mi nepre revolucios ĝis la fino sekvante la Partion, malgraŭ mia blindeco!”

De la komenciĝo de la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio pliardiĝis la batalvolo de Bude. Li diligente studas instrukciojn de Prezidanto Maŭ kaj serion da dokumentoj de la Centra Komitato de la Partio kaj profundiĝis ofte en familiojn de la komunumanoj por propagandi la grandan signifon de la movado. En la amasa kunveno li kritikis reakcian programon de Lin Biaŭ pri “sinrego por restarigi etikedon de Ĝoŭ-dinastio”, kaj akuzis la krimojn de la naciperfida kliko de Dalai kaj la malluman, kruelan kaj sovaĝan servutan sistemon per rakontado de siaj propraj travivaĵoj, la ŝanĝiĝoj de Lasi-komunumo kaj sangplenaj faktoj, kaj kuraĝigis la komunumanojn iri sensanceliĝe la socialisman vojon kaj batali por firmigi la proletan diktaturon.



GEJUNULOJ AKTIVE IRIS AL KAMPARO

Pliprofundiĝas en homan koron la instrukcio de Prezidanto Maŭ “**intelektaj junuloj iru al kamparo**”, kaj dank’ al tio plibone iris la laboro en diversaj lokoj por mobilizi intelektajn junulojn al kamparo. En vintro de 1974, jam pli ol 600,000 intelektaj junuloj de Pekino, Liaŭning, Guanghi kaj aliaj 8 provincoj, urboj kaj aŭtonomaj regionoj iris al kamparo, por kontribui al konstruado de la nova socialisma kamparo.

Dank’ al serioza studo de marksismo, leninismo kaj verkoj de Prezidanto Maŭ kaj kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la vasta amaso de intelektaj junuloj plifirmigis sian decidon iri la vojon de kombino kun laboristoj kaj kamparanoj. Ankaŭ la kadroj kaj amasoj firme rompas kun malnovaj ideoj kaj aktive subtenas siajn gefilojn iri al kamparo. La lokaj gvidantoj diversnivelaj profundiĝis en komunumojn kaj brigadojn por helpi ilin en aranĝo de intelektaj junuloj. Sub kuraĝigo de la bonega situacio de kamparo kaj zorgo de diversnivelaj partiaj organizoj kaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, la intelektaj junuloj esprimis sian decidon ne vanigi la esperon de la Partio kaj la popolo kaj dediĉi sian juneccon al la granda afero konstrui socialisman novan kamparon de la patrolando.

La Kadroj de la Nova Ĉinio Estas Ordinaraĵoj Laboruloj

EN la socialisma nova Ĉinio, la kadroj de la Partio kaj ŝtato estas servistoj de la popolo kaj ordinaraĵoj laboruloj.

Antaŭnelonge, ni vidis ke iuj gvidantaj kadroj faras fizikan laboron en la Ĉefurba Ferŝtala Kompanio. Inter ili estis Ni Ĝifu, alterna membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj sekretario de la partia komitato de Pekino, Ĉen Ŝaŭkun, ministro de la Ministerio de Metalurgia Industrio kaj aliaj respondeculoj de tiuj institucioj. En laborado kune kun laboristoj, ili konis produktan staton, helpis solvi produktajn problemojn kaj petis opiniojn de la lastaj pri gvidantoj. Je tio, multaj maljunaj laboristoj tre kortuŝiĝis, kiam ili ekrememoris la mizeran vivon sub vipado de kapitalistoj antaŭ la Liberiĝo. La laboristoj kaj oficistoj esprimis: Gvidantoj donas ekzemplon, kaj ni devas labori pli energie.

En la nova Ĉinio, la partopreno de kadroj en fizika laboro estas ordinara afero kiel observenda sistemo. Nuntempe, kadroj de la tuta lando escepte de tiuj maljunaj, malfortaj, malsanaj kaj kriplaj,

ĉiuj devas partopreni en fizika laboro. La membroj de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, kiuj estas nove elektitaj el laboristoj kaj kamparanoj, partoprenas en laboro en sia propra unuo. La gvidantaj kadroj de diversaj niveloj inkluzive de respondeculoj de provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj kaj centraj registaraj departementoj ofte venas al la plejfronto de produkto por tie partopreni en fizika laboro. La gvidaj institucioj de la Centro ĝis diversaj lokoj ĉiuj fondis kadrolernejon "la sepa de majo" por ke la kadroj alterne venantaj tie unuflanke studu verkojn de Marks, Engels, Lenin, Stalin kaj Prezidanto Maŭ kaj aliflanke partoprenu en fizika laboro. Krome, ankaŭ la diversaj fabrikoj, entreprenoj, oficejoj kaj lernejoj de la tuta lando havas sistemon pri partopreno de kadroj en fizika laboro.

Pri partopreno de kadroj en fizika laboro Prezidanto Maŭ Zedong iam montris: "La kadroj de niaj Partio kaj ŝtato estas ordinaraĵoj laboruloj kaj ne grandsinjoroj rajdantaj sur la nuko de la popolo. Partoprenante kolektivitan produktan laboron, ili tenas plej vastan, konstantan kaj intiman ligon



*Ĝang Hiuking (meze),
Vicsekretario de la
partia komitato de
la Ŝanhaja Konstrua
Buroo, en konstruejo*

kun la laboranta popolo. Tio estas granda afero de fundamenta graveco por socialisma sistemo; ĝi helpas venki burokratismon kaj preventi reviziismon kaj dogmismen." Tio klare montris ke partopreno de kadroj en fizika laboro estas bezono de la socialisma sistemo kaj neneglektebla granda afero por proleta revolucia kadro.

Partopreno de kadroj en fizika laboro estas bona tradicio de la Komunista Partio de Ĉinio. Frue en komenco de la ĉina revolucio, kiam la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo sub gvido de Prezidanto Maŭ starigis la unuan revolucion bazlokon sur Gínggang-montaro, la kadroj de la Partio kaj Ruĝa Armeo ofte laboris kune kun popolamasoj. En la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, Prezidanto Maŭ persone gvidis en Jan-an kadrojn, oficirojn kaj soldatojn kaj popolanojn en la bazloko de limregiono de Ŝenhi, Gansu kaj Ninghia por disvolvi grandan produktan movadon kun celo solvi per propraj manoj la problemojn de siaj nutraĵoj kaj vestaĵoj, kio frakasis la ekonomian blokadon de kuomintangaj reakciuloj al la bazloko kaj garantiis finan venkon de la ĉina popolo en la Kontraŭjapana Rezistmilito. En 1958, Prezidanto Maŭ, Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj aliaj partiaj kaj ŝtataj gvidantoj persone partoprenis en la konstruado de Akvokonservejo Ŝisanling, kio donis grandan kuraĝigon al la kadroj kaj popoloj de la tuta lando. Nun, ĉu malnovaj kadroj aŭ novaj ĉiuj memkonscie partoprenas en fizika laboro.

Lastatempe, ni vizitis respondeculojn de iuj partiaj kaj ŝtataj institucioj kaj koncernaj unuoj de Pekino kaj samtempe ni informiĝis de amasoj pri iliaj kortuŝaj aferoj en fizika laboro.

Kiam oni komencis ekspluati la faman petrolkampon Daking, la ministroj de Ministerio de Petroila Industrio escepte de 1-2, kiuj devas resti en Pekino por deĵori, ĉiuj veturis kune kun diversnivelaj kadroj al la vasta dezerta stepo. Vizaĝe al malfacilaj kondiĉoj, iuj proponis instalii komandojn en proksima urbo. Sed, la gvidantoj translokis sian kabineton en provizoran tendon sur la stepo kaj persistis en putoborado kune kun laboristaj amasoj en frosto kaj neĝado. La ekzemplo de la gvidantaj kadroj vekis ĉe la vastaj laboristoj kaj oficistoj pli grandan socialisman aktivecon. Dank' al partopreno en produktado la gvidantoj povis persone koni kaj direkti la laboron kaj mobilizi la amasojn por venki malfacilojn kaj rapidigi la konstruadon. Tiamaniere, oni starigis tiun grandan modernan petrolkampon nur per kvar jaroj.



Li Guohua (dekstre), vicsekretario de la partia komitato de la Ŝanhaja Kvina Ferŝtala Fabriko, laboras kune kun laboristoj.

Vang Giajang estas sekretario de la partia komitato de Hajdian-distrikto, en la okcidenta antaŭurbo de Pekino, kun okcent mil loĝantoj. Dank' al ofta partopreno en fizika laboro en produktaj grupoj kaj vizito al kamparanaj familioj, li ĉiam tenas intiman ligan kun la amasoj. Li donas tre grandan atenton al opinioj, proponoj kaj novaj spertoj de la amasoj. Li diris, ke profundiĝante en amasojn oni povas vidi ekstreme grandan socialisman aktivecon kaŝatan inter amasoj kaj trovi ilian saĝon kaj iniciativon. Kiel fama rizprodukta loko de okcidenta Pekino, Hajdian kulturis rizon jam kelkcent jarojn. Sed, la lokanoj kutime kulturis rizon kun unu rikolto en unu jaro. En vizitado Vang Giajang informiĝis ke Vankjuangĝuang-brigado de la komunumo jam rompis la kutimon antaŭ dek jaroj, kulturis kaj rizon kaj tritikon en unu jaro kaj akiris sinsekve riĉajn rikoltojn. Li kaj aliaj membroj de la partia komitato de la komunumo esploris tiun bonan sperton kaj decidis disvatigi ĝin en la tuta komunumo. Li kune kun komunumanoj fosis kanalon, ebenigis kampojn por ke ili donu du rikoltojn de rizo kaj tritiko en unu jaro. Post klopodo en du jaroj la areo de tiaj kampoj jam plimultiĝis per pli ol 80%. En 1974, post pliprodukto de tritiko, oni ricevis riĉan rikolton ankaŭ de rizo en aŭtuno. Vang Giajang ne nur intime ligas sin kun amasoj kaj modeste aŭskultas iliajn opiniojn, sed ankaŭ memkonscie akceptas kritikon kaj kontrolon de

Al Legantoj

Ni kore dankas al niaj diverslandaj legantoj, kiuj afable respondis al nia demando sendita kun n-ro 10, 1974, de nia gazeto. Multaj esprimis siajn opiniojn kaj kritikojn rilate al nia gazeto, iuj eĉ konkrete pri certaj artikoloj kaj rubrikoj, farante nemalmultajn sugestojn kaj proponojn.

Ni alte taksas la amikecon kaj varman helpemon, kiujn niaj legantoj montris al

ni. Ili multe kuraĝigis nin kaj instigis nin al daŭra klopodo por plibonigi nian laboron. Kun la subteno de nia vasta legantaro, ni kredis, ke ni certe sukcesos per Esperanto pli multe kontribui en interkompreniĝo kaj amikiĝo inter la popoloj de Ĉinio kaj aliaj landoj.

Per tiuj linioj ni esprimas nian koran dankon al niaj legantoj, kaj esperas, ke ili daŭrigu ĉiam ankoraŭ leteran kontakton kun ni.

La Redakcio

la lastaj kaj senĉese plibonigas sian laboron kaj gvidan stilon. Li diris: "En la nova Ĉinio, la fundamentaj interesoj de kadroj kaj amasoj estas samaj. La amasoj tute rajtas kritiki la mankojn kaj erarojn de la kadroj." Nun, la kadroj de tiu ĉi distrikto krom alterne iri al la kadrolernejo de "la sepa de majo", ankaŭ persiste partoprenas en

Liaŭ Hilong (meze), sekretario de la partia komitato de Ĉenghi-komunumo, Pingjang-gubernio, Ĝegiang-provinco, kontrolas pri la kreskado de rizplantoj.



laboro en fabriko aŭ magazeno po unu tago ĉiusemajne. En rikolta sezono, la kadroj, escepte de deĵorantoj, ĉiuj venas al kamparo por rikoltado.

La junaj kadroj promociitaj en la Granda Proleta Kultura Revolucio heredas bonan tradicion de la Partio kaj konservas la naturon de la laboranta popolo. Vojkonstruisto Vang Gianming estis promociita kiel vicsekretario de la partia komitato de Pekina Administracio pri Urbokonstruado en la kultura revolucio. Post tio li kiel antaŭe ofte venas al konstruejo por partopreni en laboro. Iun fojon, en rekonstruado de iu malnova ŝoseo, laboristoj trovis ke la surfaco en iu parto de la ŝoseo havas tre dikan asfalttavolon kaj opiniis ke oni povas ĝin konservi. Sed iuj neis. Vang Gianming venis tien kaj faris detalan ekzamenon. Post analizo kune kun inĝeniero li decidis ne ŝanĝi tiun surfacon de la ŝoseo. Dank' al tio oni ne nur ŝparis materialon, sed ankaŭ antaŭdate plenumis la rekonstruadon. Nun, Vang Gianming estas promociita kiel vicestro de la Pekina Konstrua Komitato. Laboristoj laŭdis lin: "Kvankam Vang Gianming havas altan oficon, tamen li ankoraŭ ofte venas al nia konstruejo por partopreni en fizika laboro."

Partopreno de kadroj en fizika laboro helpas kadrojn starigi penson tutkore kaj tutanime servi al la popolo, intimigas iliajn rilatojn kun amasoj por ke ili ĉiam konservu vicleplenan revolucionan spiriton. Tio estas unu el la gravaj faktoroj, kial la ĉina revolucia afero povas akiri venkojn.



Hiaüginĝuang- brigado

Teoria grupo en studado

Murgazeto por kritiki
Lin Biaü kaj Konfucion





Sekretario de la partia
filio Vang Zuošan



Vang Janjun, vicsekretario de la
filio de Komunisma Junulara Ligo

Politika vesperlernejo






Produkta lertulo Huo Fengling




Maljuna komunumano Vang Tingkuan, kiu ĉiam zorgas pri kolektivo

Vang Miekong, instruisto pri teorio kaj historio de la politika vesperlernejo





Maljuna malriĉkamparano Vej Vengong kritikas Lin Biaŭ kaj Konfucion per sia versaĵo.



Membro de la teoria grupo helpas maljunulinon en lernado.

Vigleplena virina volejbala teamo



Kanti pecojn de revoluciaj modelaj pekinaj operoj



La komunumanoj laŭdas la revolucion agon de la revoluciano Ĥenmin, kiu redonas doton





Ĝojo pro riĉa rikolto



Riĉa rikolto de tritiko

Komunumanoj de Hiaŭgin-
ĝuang-brigado marŝas sur
granda socialisma vojo.





Rikoltado de tomato

Venka Navigacio

SUPER la vasta maro ekster la enfluejo de Jangzi-rivero sonis sireno. Sub la brila suno iu oceana ŝipo ornamita per diverskoloraj flagoj sin direktis al la haveno de Ŝanhajo fendante ondojn. Iom post iom vidiĝis la du ideografiaĵoj "Fengking" sur la ŝipkorpo. Tuj eksonis ĝojaj huraĵoj de amasoj, tamtamado kaj tamburado ĉe ambaŭ bordoj de Huangpu-rivero. Oni aklamis la venkan revenon de la dekmil-tonela oceana varŝipo, kiu projektita kaj fabrikita de nia lando mem, inkluzive la tutan navigacian ekipaĵon, ĵus finis sian unuan longan navigacion al Mediteraneo.


La ŝipo ricevis varman kaj solenan bonvenigon, ĉar tiu ĉi ĝia navigado estis iom eksterordinara.

La ŝipo estas unu el dekmil-tonelaj ŝipoj fabrikitaj de la Giangnan-a Ŝipkonstrua Fabriko en Ŝanhajo, dum la Granda Proleta Kultura Revolucio. Ankaŭ ĝia dizelmotoro estis farita de la nomita fabriko, kaj ĝiaj diversaj ekipaĵoj kaj materialoj estis provizitaj de pli ol 500 ŝanhajaj kaj alilokaj fabrikoj. La provnavigado de 300 horoj montris, ke la kvalito kaj funkciado de ĝiaj dizelmotoro,

ŝipkorpo kaj navigaj aparatoj estas fidindaj, kaj ĝi akiris la atestilon por veturi sen limigo al ĉiuj havenoj de la tuta mondo. Sed, pro la restanta influo de la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ kaj de la blinda adorado al fremdlandaj produktaĵoj kaj teknikoj, iuj homoj hezitis fidi la kvaliton de nia memkonstruita ŝipo. Ili opiniis, ke memkonstruita ŝipo povas navigi nur en proksimaj maroj, kaj por navigi en malproksima oceano, oni devas ekipi la ŝipon per dizelmotoro kaj gravaj ekipaĵoj importitaj. Same kiel al plifruo memproduktitaj dekmil-tonelaj oceanaj ŝipoj, ili ne volis rajtigi al la ŝipo "Fengking" navigi al malproksima oceano.

La movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio vekis ĉe la ŝipkonstruaj laboristoj kaj maristoj grandan socialisman aktivecon. Ili ne plu povis toleri la absurdan logikon ke "ŝipo fabrikita de nia lando mem ne povas navigi en malproksima oceano". La laboristoj de la fabriko kaj maristoj de la ŝipo "Fengking" publikigis revolucion dazibaŭon (artikolo en grandaj literoj surmure gluita), en kiu ili emfazis: "Ni volas revolucion kaj

Varŝipo "Fengking" preterpasis la Bonesperan Kabon.



la ŝipo 'Fengking' volas navigi al malproksima oceano" kaj samtempe akre montris, ke niaj memproduktitaj ŝipoj ne povas navigi en malproksima oceano, ne pro io neenorda en la ŝipoj, sed pro la eraraj penso kaj linio de tiuj, kiuj adoras nur fremdlandajn produktaĵon kaj teknikon.

La laboristoj de la fabriko bone sciis, kian malbonon alportis la blinda adorado al fremdlandaj produktaĵo kaj tekniko. La Giangnan-a Ŝipkonstrua Fabriko estis starigita en la lastaj jaroj de King-dinastio (1616-1911), kiam la granda lakeo de fremduloj Li Hongĝang lanĉis la "movadon de okupiĝo pri fremdulaĵoj". Kiel lakeo de fremduloj Li Hongĝang diris: "Konstrui mem ŝipon en Ĉinio kostas duoble tiom kiom aĉeti ĝin el fremdlando." Por fabriki unu dumil-tonelan ŝipon la reakcia registaro de Ĉiang Kajŝek sinapogis sur Usono en ĉio de tekniko ĝis materialoj kaj ekipaĵoj. Dum 80 jaroj ĝis la Liberiĝo, la fabriko konstruis neniun oceanan ŝipon. Post la Liberiĝo, sub la gvidado de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ, la fabriko akiris senĉesan progresadon. En la granda antaŭensalto de la jaro 1958, estis konstruita unua dekmil-tonela ŝipo "Dongfeng". Sed, Liu Ŝaŭki asertis, ke "pli preferinde estas aĉeti ŝipon ol ĝin konstrui mem kaj pli preferinde estas lui ŝipon ol aĉeti ĝin". En la Granda Proleta Kultura Revolucio, la laboristoj kritikis la reviziis-


man linion de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ, kiuj adoris fremdlandojn riverencante naciperfide, kaj plenumis la principon de Prezidanto Maŭ pri **sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur la propraj fortoj** kaj fabrikis serion da dekmil-tonelaj ŝipoj en la nomita kaj aliaj ŝipkonstruaj fabrikoj.

Nun, la ŝipkonstruaj laboristoj kaj maristoj decidis fari novan kontribuon por disvolvi la bonan situacion, defendi la gajnitajn fruktojn de la granda kultura revolucio kaj disvolvi la ŝipkonstruan kaj oceannavigan aferojn de nia lando. Ilia aspiro trovis varman subtenon de la supera partia organizo kaj la vastaj laboristaj amasoj de Ŝanhajo. La ŝipo "Fengking" estis tiel baldaŭ navigacianta en malproksima oceano.

En sia unua navigacio la ŝipo, kies ekipaĵoj estis tute fabrikitaj de nia lando mem, devis veturi al Eŭropo, tio estis senprecedenca en la ŝipkonstrua kaj navigacia historioj de nia lando. Pro tio, la vastaj laboristaro kaj maristaro sentis apartan ĝojon kaj fieron.

Por ke la ŝipo brile ekokupu sian lokon en la vicaro de mondaj oceanaj ŝipoj por servi kiel amika ponto inter la popoloj de Ĉinio kaj diversaj landoj de la mondo, la laboristoj de la fabriko ankoraŭfoje kontrolis ĝiajn maŝinojn kaj ekipaĵojn ne preterlasante eĉ unuopajn ŝraŭbojn, antaŭ ĝia ekveturo.

Varŝipo "Fengking" en ŝanhaja haveno reveninta post la unua malproksima navigacio




La laboristoj de la fabrikoj en Ŝanhajo, kiuj produktis la ekipaĵojn por la ŝipo, venis al ĝi por detale prezenti al la maristoj la funkciadon de siaj produktaĵoj, alportis al ili rezervajn maŝinpartojn eventuale bezonotajn kaj deziris al ili sukceson en la unua navigacio. La maristoj, kiuj de longe sopiris fari oceanan navigadon sur memfabrikita ŝipo de nia lando, modeste lernis de tiuj laboristoj por teknike plej bone lertiĝi en uzado de la ekipaĵoj. La elektraj lineoj sur la ŝipo interplektiĝas kiel reto, la veterana elektristo alkondukis la novicojn por kontroli ilin laŭ la desegnaĵo kaj klare memori la aliron kaj deiron de ĉiu lineo.

La ŝipo veturis de la haveno de Ŝanhajo. Ĝi trapasis oceanojn, markolojn, la ekvatoron kaj preterveturis la Bonesperan Kabon, alborde dum vojaĝo en havenoj de ok landoj en Azio, Afriko kaj Eŭropo, kie ĝi trovis varman akcepton kaj laŭdon de diverslandaj amikoj kaj transmaraj ĉinoj.


Okaze de alborde en iu haveno de la Nigra Maro, en kiu estis plena de ŝipoj kaj la navigvojo fariĝis tre mallarĝa. La piloto iom maltrankviliĝis pri la kvalitoj kaj funkciado de la dizelmotoro kaj stiraj aparatoj fabrikitaj de Ĉinio. Tamen, sub lerta manipulado de la ŝipistoj, la ŝipo iris maldekstren aŭ dekstren, antaŭen aŭ malantaŭen ekzakte laŭ la ordonoj, kiuj ĉiuj efektiviĝis en kelkaj sekundoj. Kiam la ŝipo sekure alborde, la piloto kun kontento laŭdis: "Bona ŝipo kaj ankaŭ bona tekniko de la ŝipistoj."

La rumanaj amikoj tre zorgas pri la disvolviĝo de ĉina ŝipkonstrua industrio. Kiam la ŝipo atingis la havenon de Konstanco de Rumanio, grupo da ŝipkonstruaj inĝenieroj venis de malproksime por viziti ĝin. Post detala pririgardo, ili entuziasme diris adiaŭante al ŝipestro: "La kvalito de via ŝipo donis al ni profundan impreson kaj ni esperas ke tia amika interŝanĝo de tekniko daŭros konstante de nun."

Ĝuste kiam printempo komencis veni al Maŭricio, tie alborde la ŝipo "Fengking". La tieaj elmigrantaj ĉinoj akceptis la ŝipon kiel la unuan hirundon en printempo kaj unu post alia venis sur la ŝipon por fari pririgardon. Iu elmigranta ĉina maljunulino vizitis la ŝipon kune kun siaj gefiloj en la unua tago kaj rigardis ĝin de la pruo ĝis la poŭpo, de la stirakajuto ĝis la maŝinejo, kaj larmis pro ekscitiĝo. En la sekvinta tago ŝi denove venis rigardi ĝin akompanante sian edzon. Ŝi diris: "Mi volas, ke mia tuta familio vidu la ŝipon fabrikitan de la patrolando."



Kiam la varŝipo ankriĝis en haveno de Italio, multaj italaj amikoj vizitis ĝin.



Ĉe la Jokohama Haveno de Japanio, japanaj amikoj kaj elmigrantaj ĉinoj vizitas la varŝipon.

Dum sia 32,000-marmejla vojaĝo, la ŝipo transportis kvar sezonojn de la jaro kaj estis provita en grandaj ventegoj, pluvoj, furiozaj ondoj, densa nebulo, malalta aerpremo kaj aliaj naturaj kondiĉoj. La navigado de la Las Palmas de Atlantiko preter la Bonespera Kabo ĝis Maŭricio de Hinda Oceano estis serioza ekzameno al la dizelmotoro de la ŝipo. Dum la vojaĝo, ĝi senhalte funkciadis 18.5 tagojn, kaj la ŝipo estis trafita de okaklasa ventego ĉe la Bonespera Kabo. Kiel konate:

*Maloftas bonvetero al la Kab' de Bonespero:
Ne daŭras tri sinsekvajn tagojn la sunbrilo,
Nek restas tiel longe l' maro en trankvilo.*


En la tempo de preteriro de la Kabo la ventego furiozigis ondegojn sur la senlima maro, kiuj jen levis la ŝipon alte sur la ondokreston, jen ĵetis ĝin profunde en ondvalon. Sed, la dizelmotoro de la ŝipo bone funkciis kaj la ŝipo ĉiam kun alta rapideco iris antaŭen fendante la ondojn.

La farita navigacio pruvis, ke la kvalito kaj funkciado de la aliaj ekipaĵoj de la ŝipo fabrikitaj de nia lando estas ankaŭ bonaj. La radaro de la ŝipo klare montris sur sia fluoreska ekrano ĉiujn celojn en difinita sfero; la elektra kompasoj precize funkciis 120 tagojn kvarfoje trapasinte la ekzame-
nojn de la alta temperaturo en la ekvatora zono, la radia aparato havis stabilan frekvencon, altan impresiĝemon kaj bonan elektelecon. Ĉio ĉi tio garantiis sekuran navigacion al la ŝipo.

La sukcesa navigacio en malproksima oceano de la ŝipo "Fengking" kuraĝigis la ŝipkonstruajn laboristojn kaj la maristojn de nia lando. Post la finkonstruo de tiu ŝipo, sekvis la alia dek-mil-tonela oceana varŝipo "Fengguang" same projektita kaj fabrikita per niaj propraj fortoj, kiu jam venke revenis post navigacio al la Mediteraneo.

La sukceso de navigacio de "Fengking" kaj "Fengguang" prezentis la brilan perspektivon de niaj junaj ŝipkonstrua industrio kaj navigacia afero en prosperado.

*La dizelmotoro de "Fengking" kun 9,200 ĈV
funkciis bone dum la malproksima vojaĝo.*



SEN LI:

Kulturi Teknikistojn per la

DE 25 jaroj senĉese disvolviĝas la socialisma industria konstruado de Ĉinio kaj tiu bezonas grandajn nombrojn da teknikaj laborantoj. De kie venis tiuj teknikistoj? La demandon respondis Liaŭning-provinco en la Nordoriento, unu el la pezindustriaj bazoj de Ĉinio. El miloj kaj miloj da inĝenieroj kaj teknikistoj de tiu provinco, 85 procentoj estas elektitaj kaj kulturitaj post la fondiĝo de la nova Ĉinio el inter la laboristoj. Kaj, same kiel aliaj lokoj kun relative alta industria nivelo, ĝi helpas per siaj teknikaj fortoj aliajn provincojn kaj regionojn kun relative malalta industria nivelo, kiuj mem ankaŭ kulturis siajn proprajn teknikistojn. La ŝtato ĉiujare distribuas unuece al diversaj lokoj de la lando teknikajn laborantojn diplomitajn el altaj kaj mezgradaj teknikaj lernejoj.

Laŭ la informo de la respondeculo pri teknikaj laboroj de Liaŭning-provinco, la industrio de Liaŭning estis uzurpita longtempe de imperiistoj antaŭ la Liberiĝo. La fremdlandaj fabrikistoj ne volis, ke ĉinaj laboristoj ekposedu la produktan teknikon, des malpli ke ĉinoj tuŝu la gravajn industriajn fakojn. En la komenco post la Liberiĝo, la teknika forto de la nomita provinco estis tre malgranda. La disvolviĝo de la industrio kaj agrikulturo en la tuta provinco (ĝia totala produkta valoro de industrio en 1973 estis 33-oble pli granda ol tiu en 1949) bezonas pli kaj pli multajn teknikajn laborantojn. Kvankam la ŝtato funkciigas nemalmultajn universitatojn kaj institutojn por kulturigi teknikajn laborantojn, tamen ili ne povis kontentigi la bezonojn de la granda lando, tial diversaj lokoj devas laŭplane mem kulturigi la mankantajn teknikajn laborantojn el la laboristoj pere de produkta praktikado, de helpado de veteranoj al novicoj, de lernejoj funkciigataj de la fabrikoj mem k.a. Li diris: "Estas eble mem kulturigi teknikajn laborantojn, se ni nur fidus al la laboristaj amasoj kaj nin apogas sur la propraj fortoj."

Propraj Fortoj

La teknikistoj kulturitaj el laboristoj de la Dalian-a Lokomotiva kaj Vagona Fabriko mem projektis kaj konstruis multajn dizelajn lokomotivojn. La laboristdevena teknikisto Ĉang Jiŝu diris: Antaŭ la Liberiĝo, la fabriko kapablis ripari nur vaporan lokomotivon. Je la komenco post la Liberiĝo, la fabriko havis nur tri teknikistojn, kaj ili, same kiel la laboristoj, ne posedis la teknikon por fabriki dizelan lokomotivon. Sed la laboristoj diris: “Kiel mastroj de la ŝtato, ni havas decidan volon venki ĉiujn malfacilojn por fabriki produktaĵojn bezonatajn de la ŝtato.” Sub la organizado de la fabrikaj gvidantoj la laboristoj kaj oficistoj eklernis diligente la teorion pri konstruado de la dizela lokomotivo, post la plenumo de ĉiutagaj produktaĵoj, reformis malnovajn ekipaĵojn kaj disvolvis teknikan renovigadon en la tuta fabriko.


Ĉang Jiŝu diris: “Sub la helpo de la ŝtato, ni sukcesis fabriki en la jaro 1965 la unuan dizelan lokomotivon. Multaj laboristoj ekmastris respektive en sia parto la ĉefan teknikon por konstrui dizelan lokomotivon kaj fariĝis teknikistoj spertaj en produktado.” Kaj li mem estas unu el ili. En la pasinteco, li estis ordinara laboristo, nun

li funkcias kiel projektisto kaj projektis la plej novan produktaĵon de la fabriko, 4,000-ĉevalpovan dizelon por lokomotivo. Li diris ankoraŭ: “Konstrui socialismon estas la komuna celo de ni laboristoj, tial ni povas helpi unu alian por kune progresi kaj pli rapide ekposedi la teknikon en praktikado.”

Lu Ŝenghe, laboristdevena inĝeniero de la Dalian-a Fabriko de Industriaj kaj Minejaj Veturiĵoj, kiu sukcesis fari pli ol 500 teknikajn renovigojn ekde la jaro 1952, partoprenis en la teknik-interŝanĝa grupo, organizita el pli ol 300 laboristaj teknikaj renovigistoj kaj teknikistoj de fabrikoj kaj minejoj de la urbo Dalian. Sub la organizo de la loka koncerna fako, la grupo konstante zorgas pri studado de teknikaj problemoj kaj interŝanĝas spertojn. La grupanoj helpas diversajn fabrikojn kaj minejojn solvi centojn da teknikaj problemoj ĉiujare.

Inĝeniero Ĝeng Dajju de la Anŝan-a Elektra Administracio kaj la tieaj laboristoj kaj teknikistoj kune kreis en la Granda Proleta Kultura Revolucio novan teknikon por kontroli kaj ripari elektran linion kun alta tensio de 220 kilovatoj sen ĉesigo de kurento. Ili senrezerve konigis tiun novan teknikon al la vizitantoj delegitaj de diversaj lokoj de la lando por ĝin lerni. Inĝeniero Ĝeng diris: “Ni havas nur unu celon, ke pli da elektristoj posedu tiun teknikon por plirapidigi nian socialisman konstruadon.”

Jam vaste disvolviĝas en fabrikoj kaj minejoj de Liaŭning-provinco la movado de teknika kunlaboro kaj teknika renovigo, en kiu la veteranaj laboristoj rolas kiel ĉefa forto kun la partopreno de junaj laboristoj, teknikistoj kaj parto de speci-



La Dalian-a Ilmaŝina Fabriko aktive kulturis projektistojn el laboristoj. Jen ĝia projekta ĉambro.

alistoj kaj profesoroj. Trans la limoj de malsamaj profesioj kaj laborspecoj, la provinco jam organizis pli ol 100,000 homojn en teknikajn interhelpajn grupojn pri la fakoj de mekanika prilaborado, fandado, mezuriloj, elektroniko, varma traktado kaj sondado pri interna difekto ktp.

La respondeculo pri teknikaj laboroj de Liaŭning diris: “La amasa movado de teknika renovigo kaj teknika kunlaborado estas formo uzata por disvastigi la teknikon inter laboristoj.”


La vasta funkciigo de altlernejoj fare de fabrikoj apud la ŝtato estas unu el la metodoj por kulture teknikajn laborantojn en Ĉinio. La Granda Proleta Kultura Revolucio akcelis la disvolvigon de tiaj lernejoj. En la 21-a de julio 1968, la *Popola Ĵurnalo* publikigis la instrukcion de Prezidanto Maŭ “**La vojo irita de la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko en trejnado de teknikaj laborantoj el la laboristoj devas esti prenata**”. Post tio, prenante la Ŝanhajan Ilmaŝinan Fabrikon kiel ekzemplon, la diversaj industriaj fakoj kaj la grandaj fabrikoj kaj minejoj de Liaŭning-provinco fondis multnombrajn laboristajn altlernejojn, fakajn teknikajn lernejojn kaj mallongtempajn kursojn. Ĝis nun en la provinco troviĝas 55 laboristaj altlernejoj kaj pli ol cent teknikaj lernejoj; jam estas elkulturitaj pli ol 8,000 teknikistoj, kaj ankoraŭ pli ol 2,000 laboristoj nun lernas en tiuj lernejoj.

La Laborista Altlernejo de la Ŝenjang-a Pezmaŝina Fabriko fondita en la jaro 1970 sin trovas en la fabriko mem. La respondeculo de ĝia revolucia komitato diris: “La lernejo starigis fakojn de laminatado, forĝado k.a. konforme al la karaktero kaj la produktaj bezonoj de la fabriko. La instruistoj estas elektitaj el la spertaj veteranaj


laboristoj, inĝenieroj kaj teknikistoj de la fabriko kaj krome iuj venis ankaŭ de altlernejoj de Ŝenjang. La lernantoj estas elstaraj laboristoj, kiuj jam havas certan praktikan sperton, rekomenditaj de la koncernaj laborejoj. La lernotempo daŭras ĝenerale du jarojn. La lernobjektoj ampleksas marksismajn-leninismajn verkojn kaj tiujn de Prezidanto Maŭ, fakajn sciojn kaj, por iuj, ankaŭ fremdan lingvon. Koncerne al fakaj scioj, oni persistas pri la principo de kombino de instruado, produktado kaj scienca esploro, por ke la lernantoj ekposedu la teknikan teorion kaj samtempe ankaŭ helpu solvi gravajn teknikajn problemojn en la produkto de la fabriko. Dum la tempo de lernado, la laboristoj ricevas sian originan salajron kaj ĉion kion ili origine ĝuis.

Majstro Gaŭ Jungin kun 22-jara laboraĝo estis unu el la unuaj diplomitoj de la nomita laborista altlernejo, nun laboras en laminata fako de projekta sekcio de la fabriko. Aplikante la lernitajn teoriojn en ligo kun sia praktika sperto kaj aplikante avangardajn teknikojn li kaj tri aliaj teknikistoj kune plenumis en relative mallonga tempo la taskon projekti la difinitivan modelon de 250-tuna termotonda maŝino, kiu je 60 procentoj altigas la produktan efikon. Post diplomiĝo en la Laborista Altlernejo la 43-jara veterana forĝisto Ĝang Hiuŝeng, sukcesis projekti kaj fabriki kune kun aliaj laboristoj la 15-tunan tute likvapreman forĝmaŝinon kiu plibonigis la laborkondiĉojn kaj altigis la laborefikon per trioblo.

Ekde la Granda Proleta Kultura Revolucio, Liaŭning ankaŭ sendis multajn junajn laboristojn kun praktika sperto al la ŝtataj altlernejoj por altigi ilian teoriant nivelon.



La Ripara kaj Konstrua Fabriko de Agrikulturaj Maŝinoj de Fuhin-a Mongola Aŭtonoma Gubernio de Liaŭning-provinco kulturas por komunumoj nombron da teknikistoj. Jen iras teknika ekzameno.



Artaj Ludoj de Infanoj

NANDI

SUR la scenejo de Pekino estis prezentita nombro da infanaj artaj programeroj, kiuj aldonis novan brilon al la floranta ĝardeno de socialisma literaturo kaj arto de nia lando.

Kun forta epoka spirito tiuj programeroj, ĉu ĥoroj aŭ gest-kantoj, ĉu dancoj aŭ dramoj, ĉiuj spegulis la revolucionan spiriton de plenvigleco kaj progresemo de la infanoj en la nova Ĉinio, kiuj sane kreskas sub briloj de la Partio. La solo *La Ora Suno Neniam Subiros* kantita de infano de la Unua Elementa Lernejo de Guanghua-strato, la ĥoro *Ni Estas Ruĝgvardianoj ĉe Prezidanto Maŭ* kune kantita de la elementaj lernejoj Tiemen, Ĉunŝuang kaj Nanhinhuagie kaj la pianludo *Mi Amas Tian-anmen en Pekino* kune farita de la infanĝardenoj de la Konservatorio de la Centra Arta Universitato "La 7-a de Majo" kaj de Brodkasta Buroo esprimis profundan amon de infanoj al la Partio kaj Prezidanto Maŭ. La kantdanco *Trumpetisteto* prezentita de la Elementa Lernejo de Binhe-strato rakontis pri tio, ke la avo kaj la patro de iu ruĝgvardiano ambaŭ estis trumpetistoj, kaj ankaŭ li volas fariĝi trumpetisteto. Tio montris, ke la infanoj nun jam havas grandan idealon kaj ĵuras fariĝi revolucionaj daŭrigantoj de la proletaro en estonteco. La elementa lernejo Hisibej prezentis ĥoron de revolucionaj infankantoj, kiuj prikantas revolucionan spiri-

ton de la nova generacio en la kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio kaj samtempe spegulas ilian konscion pri la klasbatalo kaj la batalo inter la du linioj.

Sub la zorgado de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio, la nova Ĉinio kreis bonajn kondiĉojn, por ke la infanoj sane kresku. La prezentitaj programeroj spegulis de diversaj flankoj sanan kreskadon de la infanoj kaj ilian vivon en lernado de industria, agrikultura kaj milita aferoj kaj en kritiko kontraŭ burĝaro. La danco *Ankaŭ Ni Estu Ŝtallaboristoj post Plenkresko*, prezentita de la infanĝardeno de la institucioj rekte sub la Aerarmeo, estis agrabla kaj plena de etoso de aktuala vivo. Oni vidis, kiel la malgrandaj laboristoj en kostumo kaj kun spilstango en mano faras ŝtalfandadon. La danco sukcese bildigis al la spektantoj, ke la infanoj ŝatas fiziklaboron kaj volas esti laboristoj. Hingiekoŭ-infanĝardeno ludis la dancon *Kulturi Kukurbojn ĉe la Piedo de Ginggang-montaro*. La infanoj dancis ĝoje ĉirkaŭ la kukurbo-kampo, alte tenante slogantabulojn "Heredu la revolucionan tradicion" kaj "Nepre estu revolucionaj daŭrigantoj". Post sia diligenta sarkado, semado kaj akvumado, ili akiris riĉan rikolton. La infanoj decidis, ke ili sendos la kukurbojn al Pekino por donaci ilin al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kaj per tio ili elmontris

sian amon al Prezidanto Maŭ kaj sian noblan laboreman kvaliton. La gest-kanto *Lerni Gardstaradon*, prezentita de la infanĝardeno de la institucioj rekte sub la Aerarmeo, montris, kiel la infanoj en lernado de ĈPLA gardstaras por protekti la plantaĵojn de produkta grupo, observante revolucionan disciplinon kaj tenante akran singardemon al detruado de klasaj malamikoj.

La alia karaktero de tiuj programeroj estas tio, ke la infanoj entuziasme lernas kanti kaj ludi elektitajn pecojn de la revoluciaj modelaj teatraĵoj. La pianludo de elektitaj pecoj el *La Blankhara Knabino*, *Sagaca Kapto de la Tigra Monto* kaj *Ruĝa Signal-lanterno*, kune farita de la infanĝardenoj de la Konservatorio de la Centra Arta Universitato "La 7-a de Majo" kaj de Brodkasta Buroo ricevis varman aplaudon de spektantoj. Kiam tri infanoj, kiuj altas malpli ol piano, lerte ludis tiujn melodiojn, oni ĝoje vidis, ke la arto kaj literaturo de nia lando plene prosperas kaj la proletaro havas siajn daŭrigantojn en tiu flanko. Inter la programeroj troviĝis ankaŭ la gest-kanto *Pekino Pli Proksimiĝis al Ni* prezentita de la infanĝardeno

'La 1-a de Junio' de la Ĝenerala Proviza Departemento de ĈPLA. Ĝi prikantis venkan malfermon al trafikado de la Ĉendu-Kunming-a Fervojo. La kantdanco *Bonaj Estas la Novaj Socialismaj Aferoj*, prezentita de la 1-a Elementa Lernejo de Huajuanĉun, priskribis la amon de infanoj al la novaj aferoj.

En tiuj programeroj oni klopodis atingi unuecon de la epoka spirito kun la trajtoj de infanoj. La infanĝardeno de la Ministrejo de Eksteraj Aferoj prezentis la dancon *Forbalaado de Neĝo*, plenan je etoso de aktuala vivo de la infanoj kaj projektitan per eksterordinara maniero. Kiam leviĝis la kurteno, sur la scenejo staris kolorpentraĵo "Forbalaado de Neĝo". Poste la aktoretoj elsaltis el la pentraĵo kaj forŝovis ĝin. Jen aperis pordo de la domo de armeano. Tiamaniere la danco montris unue la tempon, ke la afero okazis en vintro, kaj due la ĉefan temon, ke la infanoj lernas de soldato Lej Feng kaj faras bonon.

Tiuj programeroj estis varme akceptataj ne nur de la infanoj, sed ankaŭ de la spektantoj kaj artaj laborantoj de nia lando.




Prezentado de la revolucia simfonio Sagiabang

Ludo sur fortepiano Mi Amas Tian-anmen en Pekino



Solo "Ĉiuj Havas Ruĝajn Korojn" el la revolucia pekin-opero Ruĝa Signal-lanterno

Ankaŭ Ni Estu Ŝtallaboristoj post Plenkresko



Disvastiganta Amikecon

JANG ĜENGLJU

STIRANTE oceanan varŝipon, sur kiu flirtis la kvinstela ruĝa flago, tra ventoj kaj ondoj, maristoj de la nova Ĉinio vizitis pli ol 200 havenojn de pli ol 70 landoj kaj regionoj, semante amikecon kaj akcelante ĝian floradon kune kun la koncernaj popoloj.

GLORA DEVO

Engravurinte en sian koron la instrukcion de Prezidanto Maŭ “**Tutkore kaj tutanime servi al la popoloj de Ĉinio kaj de la tuta mondo**”, kaj kun alta patriotisma kaj internaciisma spirito, la maristoj energie laboras por plifortigi la amikecon de la ĉina popolo al diversaj popoloj de la mondo.

Iufoje, kiam nia varŝipo “Daning” ankriĝis en la albana haveno Durres, estis ĝuste rikolta sezono de tomatoj, kiuj estis amasigitaj en la haveno, kaj ili kiel tradiciaj agrikulturaj eksportaĵoj de Albanio ne povis esti tuj eksportitaj. La maristoj de la varŝipo tre maltrankviliĝis pro tio, kaj tuj akceptis la komision faritan de koncerna institucio de Albanio, aranĝi specialan veturon por porti la tomatojn de Durres al Rijeka, Jugoslavio. Somere en Balkan-duoninsulo, la vetero ŝanĝiĝas rapide: jen la suno brule varmigas la ferdekon, jen amasiĝas grizaj nuboj kaj ektorentas pluvego. Por protekti la tomatojn, la maristoj jen fermis la holdan kovrilon dum pluvado, jen malfermis ĝin ĉe pluvĉeso. Kaj kiam pluvo faladis senĉese, ili starigis supertendon por ke la holdo estu aerumata. Dank’ al ilia prizorgado, la tomatoj neniom damaĝitaj venis al Rijeka. Tie la maristoj ĉinaj kaj albanaj jubilis kune pri la batala amikeco inter Ĉinio kaj Albanio, kantante: “Intima amiko trans maro, proksimas ja kvazaŭ najbaro”, kaj aklamante: “Enver — Maŭ Zedong”, “Maŭ Zedong — Enver”.

En 1974, ĉinaj maristoj stiris la oceanan ŝipon “Fengking” ŝargita per rizo portota al Rumanio. En du monatoj de navigado ĝi spertis la ŝanĝadon

de kvar sezonoj pro trapaso de malsamaj latitudoj. La ĉinaj maristoj kaj kamaradoj de grenprotekta grupo sur la ŝipo trifoje ekzamenis ĉiutage la temperaturon en la holdo kaj de la rizo kaj reguligis ĝin laŭbezzone. Pro tio, ili multe lacigis sin ŝvite. Kiam la ŝipo dufoje transpasis la ekvatoron, la temperaturo interne de la holdo eĉ atingis 40°C, kaj ili tagnokte zorgis pri regula ventolado. Dank’ al ilia diligenta laborado, la rizo venis al Rumanio en bona stato tiel kvalite kiel kvante. La rumanaj batalamikoj aprezis tion kiel “frukton de diligenta laborado de la ĉinaj maristoj persiste sekvantaj la instrukcion de Prezidanto Maŭ”.

PROFUNDA AMIKECO

Tiel en Korea Duoninsulo trans maro aŭ en la malproksima “lando de montaglo”, kiel en Afriko aŭ en Norda Ameriko, ĉie la ĉinaj maristoj trovis varman kaj amikan akcepton ĉe diverslandaj popoloj, kiuj montris al la ĉinaj maristoj sian sinceran sentimenton plenan de profunda amikeco al la ĉina popolo.

Kiam ĉinaj varŝipoj venis al havenoj de la Korea Demokratia Popola Respubliko, ĉiam regis en la doko varma kaj intima atmosfero, kaj lokaj gvidantoj de koncerna fako venis saluti, prizorgi la ĉinajn amikojn kaj aranĝis por ili turisman programon havantan edukan signifon. Iufoje koreaj batalamikoj eksciis ke iu ĉina maristo sur la ŝipo “Ginŝa” iam partoprenis en la Rezistmilito kontraŭ la Usona Agreso por Helpi Koreion kiel volontulo; ili konkure manpremis kaj intime interbrakumis kun li, dezirante ĉiaman verdiĝon al la batala amikeco formita per sango inter la ĉina kaj korea popoloj.

Afriko estas kontinento ardanta. Same tia estas ankaŭ la amikeco de tieaj popoloj por la

ĉina. Ĉiam kiam ĉinaj varŝipoj haltis en Daresalamo, ĉefurbo de Tanzanio, la salutado per “bonan sanon” kaj la alparolo per “amiko” sonis al la ĉinaj maristoj intime kaj varme. Kiam la ĉina varŝipo “Damin” portis al Tanzanio la unuan dizelan lokomotivon de la marko “Dongfanghong”, kiun Ĉinio sendis helpe al Tanzanio-Zambia Fervojo, okazis solena bonveniga ceremonio, en kiu partoprenis la gvidantoj de la registaro kaj multnombra amaso. Tuj kiam la lokomotivo estis deŝarĝita sur trakon sur la kajo, ekbolis jubulado en la homamaso. Kantoj kaj ĝojkrioj fandiĝis en la sloganon “Vivu la amikeco inter Tanzanio kaj Ĉinio.”

Japanio estas nia proksima najbaro, kiu apartiĝas de ni nur per strio da akvo. Antaŭ nelonge, kiam la ĉina varŝipo “Yumen” venis en sia unua vojaĝo al Niigata de Japanio, sur la kajo svarmis homamaso, kiu venis por ĝin bonvenigi. Iu japana amiko, kiu venis speciale de Tokio, prezentis al la ĉinaj maristoj memverkitajn ĉinlingvajn poemojn, en kiuj li prikantis la amikecon inter Japanio kaj Ĉinio. En la vespero, en kiu la varŝipo baldaŭ forlasos la havenon por reveni al la hejmlando, multaj japanaj amikoj denove venis al la kajo por adiaŭi ĝin. Iu maljuna avino havanta blankajn harojn donacis korbon da persimonoj al ĉinoj kaj alia pli-ol-60-jara maljunulo prezentis korbon da mandarinoj, ambaŭ petante insiste ke la ĉinaj maristoj nepre ilin gustumu. Kiam kun longa fajfado de sireno la varŝipo malrapide foriris de la kajo, flirtis en vento dekoj da koloraj paperrubandoj, kiuj ankoraŭ ligis la ĉinajn maristojn kun adiaŭantoj sur la kajo. Kiam la varŝipo jam estis malproksime, la japanaj amikoj ankoraŭ svingadis la manojn ne volante foriri de la loko.

En Kanado ĉinaj maristoj persone spertis la sinceran amikecon de la popolo de la hejmlando de Doktoro Bethune al la ĉina popolo. Iun fojon, du ĉinaj maristoj sur la ŝipo “Nanhui” grave vundis siajn manojn en akcidento dum riparado de maŝino, kiam ĝi haltis en la haveno Victoria. Kanadaj kuracistoj tre atente prizorgis ilin. Tiam al la hospitaloj de Vankuvero mankis vakaj litoj, oni faris specialajn dispoziciojn por akcepti la ĉinajn pacientojn. Krome ili dungis ĉindevenan kuiriston por prepari manĝaĵojn por tiuj pacientoj. Dank’ al ilia zorgema kuracado kaj flegado la vunditaj manoj rapide resaniĝis kaj reakiris la laborkapblon. Kaj la ĉinaj maristoj revenis al la patrolando, kunportante la profundan amikecon de la kanada popolo.

Sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la popolo de nia lando senĉese akiris novajn sukcesojn en socialisma konstruado, tiel ke dekmil-tonelaj oceanaj ŝipoj estas sinsekve konstruitaj unu post alia. Kun senkompara fiero maristoj de la nova Ĉinio venke navigadas en ventoj kaj ondegoj sur tiuj oceanaj ŝipoj. Ankaŭ alilandaj amikoj tre ĝojas pro la disvolviĝo de niaj ŝipkonstrua industrio kaj oceana navigacio.

En 1974, la dekmil-tonela oceana ŝipo “Fengking”, kiu estis projektita kaj konstruita per niaj propraj fortoj kaj estis provizita per naviga ekipaĵo senescepte fabrikita de nia lando mem, faris sian unuan vojaĝon al Rumanio trapasinte Pacifikon, Hindan Oceanon kaj Atlantikon kaj fine venke revenis al la haveno de Ŝanhajo por navigado de 32,000 marmejloj. Dum la vojaĝo, ĝi alboridiĝis en la havenoj de ok landoj en Azio, Afriko kaj Eŭropo kaj ĉie estis varme bonvenigita kaj akceptita. Multaj fremdlandaj amikoj kaj elmigrintaj ĉinoj venis de tre malproksima loko por viziti ĝin. Kiam ĝi atingis havenon de Italio, multaj italaj amikoj kaj elmigrintaj ĉinoj venis demalproksime por gratuli ĝin kaj prezenti al ĝi bukedon kaj florzvojn por entuziasme aplaŭdi la novan sukceson akiritan de la ĉina popolo.

La vastaj amasoj de patriotaj elmigrintaj ĉinoj aparte sentis senkomparan ĝojon pro la navigado de dekmil-tonelaj oceanaj ŝipoj, kiujn la patrolando mem konstruis. Ĉiam, kiam la ŝipo “Fengking” haltis en fremdlandaj havenoj, multaj patriotaj elmigrintaj ĉinoj venis kun siaj maljunaj kaj junaj familianoj por rigardi ĝin. Sub la kvinstela ruĝa flago ili sin fotigis kaj ĝoje kunrestis kun la karuloj el la patrolando. Rigardante la ŝipon, iu maljuna ĉino, kiu elmigris en Maŭricion en siaj fruaj vivjaroj emociiĝis ĝis larmoj. Alia pli-ol-80-jara maljuna elmigrinta ĉino diris: “En la malnova Ĉinio eĉ malgranda najlo estis importita, sed nun la nova Ĉinio povas fabrikii ĉion en tiu granda dekmil-tonela ŝipo. Tio estas frukto de la bona gvidado de Prezidanto Maŭ!” Ĉio ĉi tio multe kuraĝigis la ĉinajn maristojn.

Dum navigado tra kvin kontinentoj, ĉie oni trovas amikojn. Kiam ĉinaj maristoj komencas sian vojaĝon, adiaŭante la grandan patrolandon en fajfado de sireno aŭ adiaŭante fremdlandajn amikojn por reveni al la hejmlando, ilia koro ĉiam estas en granda emociiĝo. Ili volas engravuri en sian memoron la instrukcion de Prezidanto Maŭ por fari pli grandan kontribuon en disvolvado de amikeco inter popoloj de Ĉinio kaj aliaj landoj de la tuta mondo.

Denove Sonoris la Sonorilo sur la Varsovia Kastelo

VARSOVIO kun longa historio estas ĉefurbo de Pollando. Antaŭ la Dua Mondmilito troviĝis tie kastelo kun tipa pola nacia stilo. La kastelo estis ruinigita de la germanaj faŝistoj post ilia atako al Pollando en la 1-a de septembro, 1939, je la komenco de la Dua Mondmilito. Antaŭ nelonge, ĝi estas rekonstruita laŭ sia malnova aspekto, dank' al diligenta laborado kaj monhelpo faritaj de la pola popolo. Antaŭ la vespero de la 30-a datreveno de la liberiĝo de Pollando, la sonorilo sur la kastelo denove sonoris. La pola popolo rigardis la sonoradon de la antikva sonorilo kiel simbolon de sia brava rezisto kontraŭ agresantoj.

BRONZA STATUO DE HEROO

Konstruita en la 16-a jarcento, la varsovia kastelo estis atestaĵo de la batalo de la pola popolo por nacia sendependeco. Ĝi estis multfoje detruita kaj bruligita de eksterlandaj agresantoj, sed la varsovia popolo faris bravan bataladon foje kaj refoje por ĝin defendi. En 1794, la varsovianoj heroe batalis kontraŭ la prusaj agresantoj ĉe la piedo de la kastelo. En la jaro 1830, ili kondukis tie sentiman manbataladon kontraŭ la trupoj de la cara Rusio, kiu la unua dividis Pollandon trifoje, kaj ne unufoje venkis la ĝisdente armitajn carajn trupojn per falĉiloj kaj lancoj.

Por memori la heroojn, kiuj batalis por la nacia sendependeco, la varsovia popolo starigis bronzan statuon de la nacia heroo Jan Kilinski sur Krasinski-placo najbare de la kastelo. Kilinski estis ŝuflikisto. En la suferplenaj jaroj, kiam la cara Rusio, Prusio kaj Aŭstrio divide okupis Pollandon, li kiel ĉiuj aliaj poloj ne povis toleri pereigon de sia patrolando, sklavigon de sia popolo kaj dismembri-

gon de sia nacio, kaj ekprenis armilon. Li gvidis la malriĉajn varsovianojn por fari ĝismortan batalon kontraŭ la cara garnizono, tiel ke Varsovio jam liberiĝis el sub la regado de la caro kaj alte flirtis la sendependa flago super la kastelo. La varsovia popolo ĉiam memoras kaj respektas tiun nacian heroon, kiu kuraĝis batali. Kiel antaŭe, nun la popolanoj ofte venas por fari omaĝon al li kaj metas freŝajn florojn antaŭ la statuo.

ATESTAĴOJ DE KRIMOJ DE LA CARO

La varsovia kastelo vizaĝas al la bela Vistulo kaj troviĝas tie "Prizono N-ro 10" norde de la rivero.

Tiu granda prizono estis konstruita de caro Nikolao la Unua de Rusio per 6 jaroj por subpremi revolucion de la pola popolo. En kelkaj jarcentoj, la pola popolo senĉese faris batalojn kontraŭ la regado de cara Rusio. Nombroj da strikoj kaj armitaj insurekcioj turnis Varsovion en la centron de malkaŝaj kaj kaŝaj aktivadoj de la polaj patriotoj, tial la caro faris sangan kontraŭevolucian perfortan subpremadon. En la "Prizono N-ro 10" estis enkarcerigitaj multaj famaj revoluciuloj, inter kiuj estis pola revoluciulo Jaroslav Dombrovski, unu el la gvidantoj de la Pariza Komunumo, kaj elstaraj batalantoj de la internacia laborista movado Rosa Luksemburgo kaj F.E. Dzerzhinski. Tamen la revoluciaj batalantoj persistis en batalo kaj preferis morti ol surgenuiĝi. La polaj enkarcerigitoj skribis siatempe jenan bravan ĵuron: "Nek mortpuno, nek punservo, nek ekzilo al Siberio povas subigi la batalantojn, kiuj luktas por libereco kaj socialismo."

La historio estas senkompata. La batalo de la pola popolo finfine akiris venkon. Hodiaŭ

la famaĉa "Prizono N-ro 10" kune kun siaj enkarcerigaj ĉaroj, katenoj kaj pendigiloj fariĝis atestaĵoj de krimoj de la malnova caro, kiu intencis strangoli la nacian sendependecon kaj la popolan revolucion de Pollando.

LA HISTORIO MARŜAS ANTAŬEN

Kiam la banditoj de Hitlero invadis Pollandon, ili asertis, ke ili forviŝos Pollandon de sur la terglobo, kaj la ĉefstabo de Hitlero eĉ donis la ordonon komplete ruinigi Varsovion. Ili freneze masakris 800,000 urbanojn kaj brule detruis aŭ ruinigis 85 % de la urbaj konstruaĵoj. Post la milito, la loĝantoj de Varsovio rekonstruis la urbon per siaj manoj. Nun sur la kastelo, kiu estis iam detruita de la

agresantoj, la sonorilo denove sonoris laŭte. Kontraŭ la deziro de Hitlero, Varsovio ankoraŭ staras majeste dum Hitlero mem estis entombigita de la popoloj de diversaj landoj inkluzive de la pola popolo. Kaj kiel la rusaj caroj kaj la imperiestroj de Prusio kaj Aŭstrio, kiuj iam agresis, dividis kaj subpremis Pollandon, Hitlero ricevis hontindan finon.

La historio marŝas antaŭen. La batalo de la pola popolo por defendi sendependecon kaj liberecon de sia partolando certe daŭriĝos. Ĝuste kiel la nacia himno de Pollando, kiun ofte kantas la pola popolo, diras: "Pollando neniam pereos se ni vivas!" "Ni rehavigos per sabroj kion forrabis aliaj perforte!"



PLIPRODUKTI SPECIALAJN VAROJN POR NACIMALPLIMULTOJ

En Junnan-provinco de Ĉinio troviĝas pli ol 20 nacimalplimultoj. Malsamaj estas iliaj moroj kaj kutimoj, malsamaj estas ankaŭ iliaj vivbezonaĵoj. En la pasinteco, tiuj bezonaĵoj estis ĉefe produktitaj de aliaj provincoj. En la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la malpezindustriaj kaj metiaj fakoj de Kuming de Junnan-provinco decidis pli-produkti la specialajn vivbezonaĵojn por nacimalplimultoj. Ekz., en 1974 oni produktis 330,000 metrojn da diversaj pasamentoj ŝatataj de la nacimalplimultoj, pli ol 6 tunojn da diverskoloraj silkfadenoj, kaj grandkvante plimultigis dajajn kaptukojn, tibetajn akvoĉerpilojn, kaj vazojn, kruĉojn kaj diversajn ornamaĵojn de vestoj. Laŭ statistiko, la novaj specoj pogrande produktitaj de januaro ĝis septembro de 1974 nombriĝis 78, kiuj trovis varman akcepton ĉe diversaj nacimalplimultoj de Junnan.

NOVAJ KAJ MALPEZAJ PUTBORAJ INSTRUMENTOJ

Firme plenumante la principon elmetitan de Prezidanto Maŭ Zedong pri sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj, la laboristoj kaj oficistoj de Baŭgi-a Petrolmaŝina Fabriko de Ŝenhi-provinco sukcesis en provfabrikado de novaj kaj malpezaj putboraj instrumentoj — pendringo, pendtenilo kaj pendtenaĵlo, kiuj trovis varman akcepton ĉe la putboristoj.

La nomitaj produktaĵoj estas ĉefaj instrumentoj por levado dum putborado. En la pasinteco, ili estis fabrikitaj laŭ la fremdlandaj projektoj kaj teknologioj, kaj tro pezaj kaj dikaj. La putboristoj devis movi ilin meznombro preskaŭ cent fojojn en unu deĵortempo, kaj la plej peza pendringo estis vektportebla por kvar homoj. La novaj instrumentoj estas malgrandaj, simplaj, facile manipuleblaj kaj multe malpli pezaj. Ekzemple, por porti 150 tunojn oni devis uzi ringon 296 kg. pezan en la pasinteco, sed nun nur 92 kg. pezan; por porti 250 tunojn oni devis uzi tenilon 187 kg. pezan en la pasinteco, sed nun nur 83 kg. pezan; por porti 10 tunojn oni devis uzi tenaĵlon 273 kg. pezan en la pasinteco, sed nun nur 176 kg. pezan. Tio plibonigis laborajn kondiĉojn de laboristoj kaj altigis putboran efikon.



MAŬNAN-

NACIO

ZONG MIN



Maŭnan-a milicanino

MAŬNAN-NACIO kun pli ol 24,000 membroj dislokiĝas en gubernioj Huangiang, Heĉi, Nandan, Jiŝan kaj Du-an de norda parto de Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono. Pli ol 70% de maŭnan-oj koncentre loĝas en Ŝangan, Ĝongnan kaj Hianan de Huangiang-gubernio.

Komence de Song-dinastio (960-1279 p.K.), en la historiaj libroj en la hana lingvo oni nomis la lokojn Ŝangan, Ĝongnan kaj Hianan de Huangiang Maŭnan-regiono. Kaj nun maŭnan-oj kaj aliaj ĉirkaŭaj nacioj ankoraŭ tiel nomas la lokojn. En la maŭnan-a lingvo "maŭnan" signifas ĉilokanon.

Maŭnan-oj havas sian lingvon ne skriban, sed parolan, kiu apartenas al han-tibeta lingvo-familio. Ĉar de longa tempo ili kontaktiĝis kaj miksedziĝis kun han-oj kaj ĝuang-oj, plejparto de ili povoscias han-kaj ĝuang-lingvojn.

La lokoj koncentre loĝataj de maŭnan-oj situas en subtropika zono kun varmeta klimato, abunda pluvo kaj prosperaj vegetaĵoj ĉiam verdaj en la kvar sezonoj. Antaŭ la Liberiĝo maŭnan-oj sin okupis ĉefe pri agrikulturo, kies grenaj plantaĵoj estis rizo, tritiko, milio, sorgo, maizo kaj batato kaj kies ekonomiaj plantaĵoj sojfabo, kotono, tabako kaj aleŭrito.

En Song-dinastio, maŭnan-nacio jam havis klasan kontraŭstaron, kaj en la modernaj epokoj tre evidentiĝis divido de klasoj kaj agroj koncentriĝis en la mano de malmultaj homoj. Ni prenu Juhuan-subgubernion de Huangiang kiel ekzemplon. Bienuloj kaj kulakoj, kiuj okupis nur 3.8% de la tuta loĝantaro, okupis tamen 36.1% de la agro, dum malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kiuj okupis 53.4% de la tuta loĝantaro, okupis nur 18.7% de la agro. Tiam la farmanto devis pagi al la farmiganto duonon de la rikoltaĵoj. Tamen dum dudek jaroj de la regado de la kuomintangaj reakciuloj la reala enspezo de kamparanoj fakte ne atingis 40% de la rikoltaĵoj kaj 60% estis forrabita de bienuloj. Tie ankaŭ ekzistis ĝenerale ekspluato per dungado.

En maŭnan-lokoj relative evolua estis komercado. Hianan de Huangiang-gubernio estis ne nur ekonomia centro de maŭnan-oj sed ankaŭ varinterŝanĝa loko por han-oj, ĝuang-oj, jaŭ-oj kaj mjaŭ-oj. Komercistoj de diversaj lokoj alportis tien salon, kotonŝtofon, pluvŝirmilojn, kudrilojn, fadenojn kaj aliajn vivbezonaĵojn kaj samtempe aĉetis lokajn agrikulturajn, flankajn kaj specialajn produktaĵojn por kontentigi bezonojn de aliaj lokoj. Kun disvolviĝo de agrikultura produktado kaj disvastigo de socia labordivido

la diversaj metioj de maŭnan-nacio ricevis certan progreson. Ĝiaj ĉefaj metioj estis forĝado, ŝpin-tekstado, tinkturado, kudrado kaj farado de bambuiloj, arĝentaĵoj kaj ŝtonartaĵoj. Kaj la koloraj bambuaj ĉapoj plektitaj de maŭnan-oj estis tre belaj kaj delikataj, kiuj trovis bonan akcepton en la ekspozicio pri metiartaĵoj de nacimalplimultoj post la Liberiĝo.

Maŭnan-nacio havas longan historion kaj revolucionan tradicion. De longa tempo maŭnan-oj kune kun aliaj naciaj popolanoj faris senĉesan batalon kontraŭ subpremado kaj ekspluato de feŭdaj regantoj kaj kuomintangaj reakciuloj. Nemalmultaj maŭnan-oj partoprenis en Tajping-a Armeo dum la revolucia movado de la Tajping-a Ĉiela Regno. Antaŭ la Liberiĝo, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, maŭnan-oj starigis popolan armitan forton, faris penigan batalon kaj liberigis la maŭnan-lokojn kunage kun la Ĉina Popola Liberiga Armeo.

Post la Liberiĝo, sub la brilo de la nacia politiko de la Partio, reprezentantoj de maŭnan-oj havis sian lokon en la popola registaro de diversaj niveloj, kaj per tio efektivigis siajn egalrajtojn inter ĉiuj nacioj kiel mastroj de la lando. Dank' al kora zorgado kaj kulturado de la Partio multaj elstaraj elementoj el maŭnan-oj aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio kaj iuj estas promociitaj kiel gvidantoj de gubernioj kaj komunumoj.

La liberiĝo en politiko multe altigis socialisman revolucionan entuziasmon de maŭnan-oj. En pli ol 20 jaroj, sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, maŭnan-oj venke plenumis

agraran reformon kaj efektivigis popolkomunumigon kune kun han-oj kaj ĝŭang-oj. Precipe post la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj en la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, granda ŝanĝiĝo okazis al maŭnan-lokoj. Ekzemple, en la amasa movado de lerno de Daĝaj la maŭnan-aj kamparanoj de Hianan-komunumo de Huangiang energie entreprenis fundamentan konstruadon de kampoj per siaj propraj fortoj. Ĝis la fino de 1973, la tuta komunumo konstruis 23 malgrandajn akvorezervejojn kiuj povas enteni 10,000 kubmetrojn da akvo. La areo de kampoj, kiuj donas riĉan rikolton ĉu en sekeco ĉu en superakvo, plimultiĝis de 130 hektaroj en la komenca periodo post la Liberiĝo ĝis pli ol 530, kio multe pliproduktis grenon en sinsekvaj jaroj.

Antaŭ la Liberiĝo troviĝis neniu industrio kaj trafiko en maŭnan-lokoj. Nun Hianan-komunumo sola konstruis tri malgrandajn hidroelektrejojn kaj krome 19 malgrandajn fabrikojn de agrikulturo, sukero kaj fajencaĵoj.

Dank' al la Granda Proleta Kultura Revolucio la nombro de mezlernejoj kaj elementaj lernejoj multe pliiĝis kaj multaj maŭnan-aj gejunuloj vizitas altajn lernejojn en Pekino, Kanton, Vuhan, Nanning kaj aliaj urbegoj. En Hianan-komunumo la ŝtato konstruigis nacian hospitalon kun modernaj ekipaĵoj, kio ĝisfunde ŝanĝis la staton de la loko al kiu mankis kuracistoj kaj medikamentoj antaŭ la Liberiĝo. Nun ĉiuj produktaj brigadoj havas siajn proprajn nudpiedajn kuracistojn.

Kun senĉesa disvolviĝo de ekonomio multe leviĝis la nivelo de sano kaj vivo de maŭnan-oj.



SINTEZA BREMSŜUO SUKCESE PROVFABRIKITA

En kunlaboro kun la koncernaj fervojaj unuoj, la asbestaĵaj fabrikoj de Pekino, Tiangin, Ŝenjang, Hi-an kaj Hangĝoŭ sukcese provfabrikis sintezan

bremsŝuon de trajno, kio estas grava renovigo en trajnaj haltigiloj de nia lando.

La rada bremsŝuo estas ĉefa haltiga aparato de trajno. Nun la sinteza bremsŝuo el asbesto, rezino k.a. estas je duono malpli peza ol la antaŭa el gisaĵo. Ĝia frotrezisteco altiĝis je kvaroblo, kaj la haltigado estas pli milda, plenumiĝas en malpli longa distanco kaj samtempe ne produktas sparkojn, kio sekurigas veturadon kaj ankaŭ kreis kondiĉojn por altigi la veturan rapidecon. Ĉio ĉi tio estas pruvita de fervojaj fakoj post longtempa provado en frosta kaj humida-varma zonoj, precipe sur iom pli kruta deklivo.

La Progresema Historia Rolo de la Unua

Imperiestro de Kin-dinastio

LA Unua Imperiestro (259-210 a.K.) de Kin-dinastio estis eminenta politikisto de la nove leviĝanta bienula klaso en la antikva Ĉinio kaj la granda historia persono kiu la unua unuigis Ĉinion. Li ludis gravan progreseman rolon dum la granda socia ŝanĝiĝo de la sklava sistemo al la feŭda en Ĉinio.

En la lasta periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770-476 a.K.) komencis disfali la sklava sistemo kaj leviĝi la feŭdismo en nia lando. Okazis eĉ pli granda sociŝanĝo en la lasta periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a.K.). Ĝi prezentigis kiel epoko de transformiĝo de feŭda lando kun multaj separatismaj dukregnoj en tiun unuigitan kun centralizisman registaron, dum kiu plie detruigis la postrestaĵoj de la sklava sistemo kaj stariĝis kaj disvolvigis la feŭdan sistemon en la tuta lando. La tendenco al unuiĝo spegulis la postulon de la ekonomia disvolviĝo de la socio, dum ĝin malhelpis la separatisma divido de la lando en dukregnoj, kiu favoris al konservo de la postrestaĵoj de la sklava sistemo. Tial la legalizistoj reprezentantaj la interesojn de la nove leviĝanta bienula klaso pledis por fondi unuigitan centralizisman feŭdan ŝtaton. Ĝuste en tia cirkonstancaro la Unua Imperiestro de Kin-dinastio aperis sur la historia scenejo.

Post la enmanigo de la potenco, li decideme subpremis la reakciajn fortojn, kiuj energie klopodis por restarigi la sklavan sistemon, enoficigis multajn legalizistojn kaj venke kondukis progreseman militon por unuigi Ĉinion, kion li atingis en la tempo daŭro de dek jaroj (230-221 a.K.). Li fondis la unuan unuigitan feŭdan ŝtaton monarkian kaj centralizisman, anstataŭigante en la tuta lando la sistemon de heredado de titoloj kaj privilegioj de nobeloj kaj landgrafoj postlasitan de la sklava socio per la nova sistemo de burokratoj kaj gubernioj, tiel ke la imperiestro firme kaptis en sia mano la militan

kaj politikan povojn kaj la rajton de nomado kaj eksigo de la ĉefaj oficistoj de la ŝtato. Tio estis politika reformo, kiu konformis al la historia tendenco kaj havis profundan kaj longan influon. La sistemo de gubernioj kun centralizita potenco en la centro, fondita de la Unua Imperiestro de Kin-dinastio, estis daŭre heredita de la postaj dinastioj en la feŭda socio de Ĉinio.

En la dukregnoj antaŭ la unuiĝo de Ĉinio, “malsamaj estis la mezuroj de la tero, la larĝecoj

La Unua Imperiestro de Kin-dinastio



inter la veturilaj radoj, leĝoj, kostumoj, paroloj kaj skribadoj”. Tio multe malhelpis la firmigon de la politiko kaj la disvolviĝon de la ekonomio kaj kulturo en la jam starigita monarkia centralizisma feŭda ŝtato.

En la jaro 216 a.K. la Unua Imperiestro de Kin-dinastio dekretis pri “enregistriĝo de agroj laŭ propra raporto de la popolo”, kio leĝe rekonis la privatan posedsistemon de agroj en la tuta lando kaj akcelis ĝian disvolviĝon, kaj tiel plie likvidis la postrestaĵojn de la sklava sistemo. La nomita dekreto ne nur larĝe antaŭenpuŝis la socian ekonomion, sed ankaŭ plifirmigis la kun ĝi ligitan superstrukturon. La imperiestro krome ordonis konstrui landvojojn por ĉevalkurado, unuecigi larĝecon inter veturilaj radoj kaj fosi riverojn kaj kanalojn, por faciligi la trafikajn interligiĝojn inter diversaj lokoj de la lando. Li unuigis la malnovajn monajn kaj mezurajn sistemojn en diversaj antaŭaj grafregnoj per uzitaj novaj mon- kaj mezur-sistemoj sur la bazo de tiuj uzataj en Kin-regno kaj difinis la norman skribadon — *hiaŭĝuan*. Pli poste aperis la skribformo *liŝu*, kies disvastiĝo irigis la hanajn ideografiaĵojn en la sferon de la moderna ĉina skribado. Tio havis ne nur grandan realan signifon en siatempaj historiaj kondiĉoj, sed ankaŭ profundan influon en la postaj tempoj al la disvolviĝado de ĉinaj ideografiaĵoj.


Prezidanto Maŭ diris: “Ĉiu ajn nova afero trapasas malfacilan kaj zigzagan vojon en sia kreskado.” Dum la efektivigado de tiuj gravaj refor-

Unuigo de la mezura sistemo. La Unua Imperiestro de Kin-dinastio fabrikigis diversajn normigitajn mezurilojn por pezo kaj volumeno. Supre: bronza volumena mezurilo ŝeng; malsupre maldekstre: fajenca volumena mezurilo doŭ; malsupre dekstre: bronza pezilo por pesilo.



moj, la Unua Imperiestro de Kin-dinastio spertis gravajn politikajn batalojn unun post alia. Kvan-kam la malnovaj aristokratoj reprezentantaj la postrestantajn fortojn de la sklava sistemo estis faligitaj, tamen ili ĉiam klopodis por restarigi la malnovan sistemon, en ĉiuj profiteblaj okazoj. En la jaro 213 a.K. *Boŝi**-konfuciano Ĉunju Jue atakis antaŭ la Unua Imperiestro la tiaman politikan sistemon kaj pledis por aboli la sistemon de gubernioj kaj restarigi la sistemon de dukregnoj funkciintan ekde Okcidenta Ĝoŭ-dinastio. Pri tio la imperiestro diskutigis la kortegon. Ĉefministro Li Si refutis la absurdan opinion de Ĉunju Jue, dirante, ke en malsama epoko, malsama metodo devas esti uzata por regi la landon. Li rimarkigis samtempe, ke oni devas malpermesi al tiuj konfucianoj, kiuj adoras la antikvecon, ignorante la nunecon, ataki ĉion hodiaŭan per antikvaj konceptoj, kalumnii la nunan politikon kaj agite konfuzi la popolamasojn. Li proponis forbruligi ĉiujn historiajn librojn de la aliaj dukregnoj, escepte tiun de Kin, kaj la verkojn konfucianismajn konservatajn de privatuloj kaj firme subpremi tiujn kiuj pledas por restarigi la antikvan sistemon kaj oponas kontraŭ reformoj. La Unua Imperiestro akceptis la proponon de Li Si kaj efektivigis ĝin. En la sekvinta jaro, iuj reakciaj intelektuloj rekomencis senbride kontraŭrevoluciajn agadojn, disvastigante mensogojn, trompkonfuzante la publikon kaj atakante la politikan linion kaj gravajn reformojn de la Unua Imperiestro. Kontraŭ tiuj reakciaj subfosadoj, tiu ĉi alprenis firmajn kontraŭrimedojn. Li unuflan-

Koncentrigo de la armea povo. Li uzis bronzan tigrforman atestilon por prui aŭtentikecon de ordono en movo de trupoj. La atestilo kun gravuritaj ideografiaĵoj sur la dorso estis konsistanta el du partoj kune formantaj tigron, la dekstra en la mano de imperiestro kaj la maldekstra donita al loka aŭtoritato aŭ generalo, al kiu la sendito portis la dekstran parton por prui ke li vere portas la ordonon de la imperiestro.



ke protektis la legalizismajn intelektulojn kaj aliflanke averte subpremis pli ol 460 reakciajn konfucianojn. Tio estis nomata en la historio la “bruligo de libroj kaj enterigo de konfucianoj”.

Laŭ marksismo, kun la ŝanĝo de la ekonomia bazo, ŝanĝiĝos pli aŭ malpli frue ĉiuj ĝiaj superstrukturoj; por firmigi la novan ekonomian bazon kaj novan socian sistemon, necesas likvidi la malnovajn pensojn. La “bruligo de libroj kaj enterigo de konfucianoj” fare de la Unua Imperiestro estis ĝuste forta bato al la malnovaj pensoj, por protekti la nove starigitan politikan kaj ekonomian sistemon, diktatorado de la nove leviĝanta bienula klaso super la sklavposedantoj kaj separatismaj fortoj en politika kaj ideologia sfero, batalo kontraŭ restarigo de la malnova sistemo kaj progresema paŝo konforma al la disvolviĝo de la historio.

De pli ol 2,000 jaroj diversaj konservativuloj kaj reakciuloj ĉiam distordis la historion kaj malice blasfemis la Unuan Imperiestron de Kin-dinastio, priskribante lin kiel la plej grandan “tiranon” en la historio kaj absurde akuzante lian “bruligon de

libroj kaj enterigon de konfucianoj” kiel la plej “kruelan politikon”. Same kiel la konfucianoj kaj aliaj reakciuloj de ĉiuj pasintaj dinastioj, la kontraŭpartia kliko de Lin Biaŭ ripetis tiun ilian blasfemon kontraŭ la Unua Imperiestro de Kin-dinastio. Fakte, la imperiestro kiel specialisto, kiu alte taksis aktualajn ideojn kaj ignoris arkaikan antikvaĵon, persistis en reformado, progresado kaj oponado kontraŭ regreso. Se li ne uzus la revoluciajn fortojn, li ne povus frakasi la frenezan kontraŭrevolucian agadon celantan restarigi la sklavan sistemon. Blasfemante la Unuan Imperiestron de Kin-dinastio, Lin Biaŭ kaj liaj kunuloj celis nenion alian ol provi restarigi la kapitalismon kaj retrotiri la historion, uzante la rimedon aludi pri la aktualaĵo per cito de pasintaĵo.

Tamen la historiaj radoj ĉiam antaŭen ruliĝadas kaj antaŭmorta baraktado de ĉiuj ajn reakciuloj neniel povas bari la torenton de revolucia fluo.

**Boŝi estis titolo de oficisto kun funkcioj de eksperto pri historiaj aferoj kaj kuratoro de biblioteko.*



NOVA DISVOLVIĜO DE PEKINA MALPEZINDUSTRIO




Serioze praktikante la principon “**teni la revolucion kaj stimuli la produkton**”, la laboristoj kaj oficistoj de la pekina malpezindustria fronto diligente pliproduktas por kontentigi la bezonon de la popolo per siaj produktaĵoj.


Statistiko diras, ke la produkta valoro de malpezindustrio de la tuta urbo de januaro ĝis oktobro de 1974 kreskis je 10 procentoj ol tiu de la sama periodo de 1973. Krome, oni sukcesis en provfabrikado de pli ol 2,000 novaj specoj, inkluzive de aŭtomata brakhorloĝo, mola kaj brilkolora silk-akril-fibra trika fadeno,

lan-poliestera ŝtofo kaj novtipaj sunokulvitroj kapablaj alĝustigi aŭtomate siajn ombrojn de mallumo en diversaj lumaj kondiĉoj.

Por plibonigi la kvaliton kaj plimultigi la specojn de produktaĵoj la laboristoj kaj oficistoj de la fabriko ofte iras al magazenoj kaj kamparo por fari enketaĵon kaj peti opiniojn de la amasoj. Ili kritikas la reviziisman principon “**meti profiton en la unuan lokon**”, persiste prenas la bezonon de la popolo kiel produktan direkton kaj aktive produktas malgrandajn varojn ĉiutage bezonatajn de popolanoj kaj specialajn varojn por naci-malplimultoj. Disvolvante la spiriton de sinapogo sur propraj fortoj kaj penema lukto en malfaciloj, ili faras amasan teknikalan renovigadon. Nur en ŝpinteksa industrio oni jam faris pli ol 4,200 teknikajn renovigojn en la unuaj tri trimestroj kaj per tio akcelis la pluapaŝan disvolviĝon de la produkto.

Kateto Kaptas Raton





Bonvolu Aboni Nian Gazeton

ĉe Jenaj Adresoj

(Adresoj kun stelo estas tiuj de esperantistoj)

FR Germanio:

W.E. Saarbach GmbH
D-5000 Köln 1
Follerstr. 2
Postfach 101610
Tel. 234631

Kubon & Sagner
D-8000 München 34
Heßstr. 39/41
Postfach 68
Tel. 522027

☆S-ro Ludwig Pickel
Postfach 2113, 85 Nürnberg 2
(Poŝtĉekkonto: 819 56)

☆Libro-Servo de LEA/G
S-ro Gerhard Kunze
Halden 333
D 7291 Wittlensweiler

Hispanio:

Editorial CABAL
Avda. Jose Antonio 55
Madrid-13

Islando:

Arnthor Helgason
Fornhaga 11
Reykjavik

Italio:

Edizioni Oriente
Via S. Sisto, 9
20123 Milano (C.C.P. 3/57377)

Associazione Italia-Cina
Via del Seminario, 87
00186 Roma (C.C.P. 1/59240)

Libreria Proletaria
Via Spallanzani 6/8
20129 Milano (C.C.P. 3/22401)

Libreria Popolare
Via S. Anselmo 13
10125 Torino

☆Itala Esperanto-Federacio
Via Villoresi 38
I-20143 Milano (P.ĉ.K. 3/43154)

☆S-ro Ermanno Mello
str. Monte Nero, 22
I-20135 Milano (C.C.P. 3/43671)

Japanio:

東方書店
東京都千代田区神田神保町1-3

亜東書店
東京都千代田区神田錦町1-4
日中友好会館内

中国書店
福岡市住吉3-13-3

内山書店
東京都千代田区神田神保町1-15

株式会社 満江紅
東京都千代田区神田神保町3-15

朋友書店

京都市左京区吉田神楽岡町8番地

株式会社 燎原書店

東京都千代田区神田神保町1-16

中華書店

東京都文京区後楽1-5-3 善隣学生会館内

☆坂井松太郎

東京都杉並区成田西2-11-73

☆竹中治助

愛知県西春日井郡西枇杷島町十軒裏28

☆徳田六郎

静岡市水落町9-1

☆関西エスペラント連盟

大阪府豊中市曾根東町1-11-46-204

Jugoslavio:

☆Tomo Plačkovic
P. Fah 90
52001 Pula

☆Boris Buneta
Rusanova 14/II
41 Zagreb

☆Živko Milojević
Sindelićeva 21
32300 Gornji Milanovac



- Kanado:**
China Arts & Crafts Ltd.
33 East Hastings St.
Vancouver 4, B.C.
- NC Press Ltd.
500 King St. West 211
Toronto Ont.
- Great Wall Book Store
363, Spadina Ave.
Toronto 130, Ont.
- ☆S-ro R. Eichholz
2040 Springbank Rd.
Mississauga, Ontario
- Kolombio:**
Pedro Forero R.
Apdo. Aéreo No. 95113
Bogotá
- ☆S-ro Lope Ortegón
Diagonal 85 No. 26-27
Bogotá, D.E.
- Kostariko:**
Oficina de Fomento Comercial de
la Republica Popular China y
Costa Rica S.A.
Apartado 6015
San José
- Luksemburgio:**
Herrn A. Franck
28, Rue Beaumont
Bonnevoie
- ☆S-ro Ries Marcel
80 Rue de la Paix
Dudelange
- Meksikio:**
Sociedad Amigos de China
Popular
Apartado Postal No. 13582
México 13, D.F.
- Sociedad Mexicana de Amistad
con China Popular
Insurgentes 473
Despachos 303-304
México 11, D.F.
- Nederlando:**
Chinese Book Company
B. Bantammer Str. 22-24
Amsterdam C
- ☆Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176
Rotterdam-3002 (Poŝtĉekkonto:
378964)
- ☆Libroservo FLE
S-ino A. Kwantes-Munnik
Marnixstr. 57
Haarlem
- Norvegio:**
Vennskapssambandet Norge-Kina
Postboks 57
Blindern
Oslo 3
- ☆Eldonejo Esperanto A.S.
Box 942
Oslo
- Nov-Zelando:**
Progressive Book Society Ltd.
82 Victoria Street, W.
P.O. Box 5151
Auckland 1
- Christchurch Co-op Books
12 New Regent Street
Christchurch
- Peruo:**
Sr. Manuel Jesús Orbezo
Instituto Cultural Peruano-Chino
Santa Martha 139
Pueblo Libre
Lima
- Svedio:**
KINATIDSKRIFTER
Box 7122
402 32 Göteborg
- BOKCAFET
Lunds Bok och Tidskriftsaktie-
bolag
S:t Petri Kyrkogata 7
222 21 Lund
- ☆Eldona Societo Esperanto
Fack S-200 42
Malmö 7
- ☆Esperanto-Skolan
Barnhusgatan 8
Stockholm C
- Svislando:**
Livres et Objets d'Art
Peuple et Culture
1, Rue Schaub
CH-1202 GENÈVE (C.C.P. 12-
192'32)
- ☆S-ro Otto Walder
Esperantoweg 10
CH 8590 Romanshorn
- Usono:**
China Books & Periodicals
2929 24th Street
San Francisco, CA 94110
- China Books & Periodicals
125 5th Avenue
New York, NY 10003
- China Books & Periodicals
210 W. Madison Street
Chicago, IL 60606
- NCSC (Wash.)
7842 Wisconsin Ave.
Bethesda, MD 20014
- New China Book Store
1260 Stockton St.
San Francisco, CA 94133
- ☆S-ro William H. Schulze
Esperanto-Inform-Centro
410 Darrell Road
Hillsborough, CA 94010
- Venezuelo:**
El Viento del Este C.A.
A.P. 16181, El Coliseo
Caracas 101



Sur la Kovrilo:

Vang Tinghe, vicsekretario de la partia filio de Hiaŭginguang-brigado kaj juna komunumanino Ju Fang parolas pri bonega situacio de agrikulturo.

EL POPOLA ĈINIO 中國新道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO
P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distibuanto: Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj
Eldonaĵoj), P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

N-ro 2 (199) 1975

Ĉefa Enhavo

Nova fizionomio de Hiaŭginguang	1
El versaĵoj de komunumanoj de Hiaŭginguang	7
Studo de filozofio en Kingian-brigado	8
Fiŝista vilaĝo ĉe marbordo	13
Heroaĵoj de tibetana komunisto Bude	16
La kadroj de la nova Ĉinio estas ordinaraj laboruloj	20
Venka navigacio	23
Kulturi teknikistojn per la propraj fortoj	26
Artaj ludoj de infanoj	29
Navigado disvastiganta amikecon	31
Denove sonoritis la sonorilo sur la varsovia kastelo	33
Maŭnan-nacio	35
La progresema historia rolo de la Unua Imperiestro de Kin-dinastio	37



Amikecaj Fruktoj


En 1964, la albana registaro donacis al nia lando dek mil oleolivarbidojn. Kaj tiuj valoraj arbidoj, kiujn antaŭe oni kulturis en 8 provincoj kaj aŭtonomaj regionoj, nun jam vivas en 16 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj. Ankaŭ iuj komunumoj, brigadoj kaj komunumanaj familioj komencis ilin planti. Nun la arboj jam nombriĝas kelkcent mil. En Hajkoŭ-a Arbokulturejo de Kunming, la oleolivarboj plantitaj sinsekve de ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj kamarado Mehmet Shehu prospere kreskas kaj donas abundajn fruktojn. En la lastaj jaroj la hortikulturistoj de Sanmengiang-arbokulturejo de Guanghi elkulturis kvardek mil tiajn arbidojn el arbobranĉoj por 12 provincoj kaj municipoj kaj kontribuas per tio al kreskigo de la amikeco inter la ĉina kaj albana popoloj.

Rikoltitaj oleolivoj

Elektado de oleolivoj por prilaborado





Nova Produkto, Nova Ekipaĵo



Indukta elektrona akcelilo, nova medicina aparato, fabrikita de Ĉinio, estas efika en kuracado de kancerroj en iuj specialaj kaj ekstercentraĵ lokoj.


La Ŝanhaja Kvina Fotoaparata Fabriko, origine fabriketo funkciigita de kvartalo, mem projektis kaj fabrikis la frezmaŝinon multuzan por fotoaparata korpo.




La laboristoj kaj oficistoj de la Traktora Dentrada Fabriko sukcesis en provfabrikado de populara mekanika mano. Ĝi estas ekipaĵo kapabla memservi laboristojn kaj utiligata post reĝustigo en fabriko kaj aliaj ilmasinoj.

La teknika ekipaĵo, kiu funkcias kiel homa mano, estas ĝenerale nomata "mekanika mano". Kun rapida disvolviĝo de nia industrio kaj senĉesa altiĝo de aŭtomatigo, nia laboristaro mem projektis kaj fabrikis diversajn mekanikajn manojn kaj uzas ilin en multaj produktadoj, persistante en la principo "sendependeco kaj memstaro, sinapogo sur propraj fortoj". Ĉisube estas fragmento, kiel la ŝanhajaj laboristoj faras teknikan renovigon, provfabrikas kaj uzas mekanikajn manojn.

La Dua Aŭtoparta Fabriko projektis kaj fabrikis truan ilmaŝinon multuzan por krusto de ekstera aŭtolampo, kies transporta teknologio estas plenumata de mekanikaj manoj kio formis aŭtomatan produktan linion.







Jen la tutlikvoprema mekanika mano instalita de la laboristoj kaj oficistoj de la Tria Transporta Administracio mem, kiu povas turni 360 gradojn dekstren aŭ maldekstren kaj kies brako povas leviĝi kaj malleviĝi, etendiĝi aŭ maletendiĝi por kapti varojn pezajn je 150-250 kg., estas favora al transportado en mallarĝa loko aŭ de venenajoj.

Ŝanhajaj Laboristoj Esploras, Fabrikas kaj Uzas Mekanikajn Manojn

Junaj laboristoj de la Elektroaparata Plasta Fabriko sukcese reformis plastigon en aŭtomatan plastigan modilon kontrolatan de cifera procedo, kio pluapŝe altigis la efikon de tiu mekanika mano





Arba koridoro

Arba Koridoro de Ŝoseo

Ambaŭflanke de la ŝoseo 1,990 kilometrojn longa en Ĝoukoŭ-regiono oriente de Henan-provinco staras vicoj da verdaj arboj, kiujn la amasoj nomas arban koridoron. La kulturitaj arboj en la loko ne nur protektas la ŝoseon kaj liveras lignojn, sed ankaŭ povas bari venton, fiksi sablon, konservi akvon kaj malhelpi erozion, kio akcelis la disvolviĝon de agrikulturo kaj paŝtado.

Fotoj de Vej Deĝong





Arboprotektantoj



Plektajoj el vergetoj kreskantaj
ambaŭflanke de la ŝoseo

Prosperaj arboj ambaŭflanke de la ŝoseo
en Kongjing de Hiangĉeng-gubernio





Verki ĉinstilajn pentraĵojn



千秋功罪 我们评说

Ni Komentariu la Historion



El la Amasoj (lignogravuraĵo)

Jangkjuan-aj Laboristoj- Amatoroj en Pentra Kreado



Laboristino Ĝu Ĝu en lignogravurado

Post la Granda Proleta Kultura Revolucio, la laboristoj-amatoroj de Jangkjuan de Ŝanhi-provinco aktive faras pentran kreadon. La plejparto de la lokaj laboristoj-amatoroj estas karbistoj. Ĉar ili persistas en partopreno de laboro, aktive sin jetas en ardan revolucion batalon kaj serioze studas la literaturan kaj artan penson de Prezidanto Maŭ, iliaj artaĵoj havas altan ideologian nivelon kaj densan vivetason kaj estas laŭdataj de la amasoj.



Nova Startpunkto de Aŭtomatigo




Liberigitaj tibetanaj servutuloj de Ĝjangze-gubernio en ĉevala kurkonkurso


Amasa Sporta Aktivado sur Tibeta Altebenajo

Arkopafistoj tibetana, menba-a kaj loba-a de Lasao





Kjutanghia



Hilinghia

Tri Gorgôj de Jangzi-rivero

Jangzi-rivero, la plej granda rivero de Ĉinio, longas je 5,800 kilometroj. Ĝia meza parto trapasas de okcidente orienten la gigantan Vuŝan-montaron kaj formis tie tri famajn gorgôjn de Jangzi-rivero, nome Kjutanghia, Vuhia kaj Hilinghia. La rivero en tiu parto de Bejdiĉeng de Siĉuan-provinco ĝis Nanginguan de Hubej-provinco longas ĉ. 200 kilometrojn.

Ambaŭflanke de la tri gorgôj staras altaj montoj kun krutaj deklivoj kaj kuŝas profundaj ravinoj; kaj en la gorgôj naviga vojo estas mallarĝa, rifoj multaj kaj fluo rapida, tial oni nomis ilin natura danĝerejo.


En la malnova socio, pro manko de riparo, la

naviga vojo tie ĉiam pli malprofundiĝis kaj mallarĝiĝis kaj veturado kontraŭ fluo dependis de haŭlado. Kiom da ŝipoj kaj popolaj vivoj kaj riĉaĵoj estis englutitaj tie de danĝeraj rifoj!

Post la Liberiĝo, la nova Ĉinio donis grandan atenton al ordigo de naviga vojo de la tri gorgôj, ekzemple forigi danĝerajn rifojn per eksplodo kaj instalati diversajn navigajn signalojn por garantii sekurecon en navigado kaj sukceson eĉ en nokta navigado. En nokto, la ŝiparo kun brilaj lampoj frekventas inter Congking kaj Vuhia. Nun, la antikvaj tri gorgôj rebrilas per sia imponeco.

Sur la Dorskovrilo: Vuhia

Nokta navigado en tri gorgôj



Instalati navigan signalon



